

中國新道

EL POPOLA ĈINIO



- Ĉina-sovetia supera intervidiĝo
- La hodiaŭaj Shu-vojoj (1)
- Natura traduklingvo







INTER NI

Ni ŝuldas koran dankon al s-ro Andrzej Petlyn, ke li prezentis al ni multajn bonajn konsilojn en sia letero. Ni petas pardonon de niaj legantoj, ke pro la limigo de paĝoj, ni publikigas nur kelke da paragrafoj de la letero.

La Red.

Bonvena estas la rubriko "Intervjuoj". En la februara numero mi trovis la unuan intervjuon kun fabrikestro Di Junsan, sed por esti sincera mi iom seniluziĝis, ĉar tio estis rakonto pri homo prezentita per la vortoj de ĵurnalistoj. Aŭ oni faru verajn intervjuojn kun demandoj de ĵurnalistoj kaj pravortaj respondoj de la intervjuato.

Se temas pri novigoj la redakcio ofertis al ni, legantoj, novan rubrikon "Facetoj de la ĉina socio", tre bona ideo! Sekvas tute interesa artikolserio "Laŭ la Suda Silka Vojo" kaj la rimarkinda artikolserio pri "La Imperiestra Palaco". Laŭ esperantista vidpunkto certe bonvena estas la nova rubriko "Libera Forumo de Eminentaj E-istoj". La serion malfermas la artikolo de Chen Yuan "Mi kaj miaj kvin E-instruistoj", laŭ kiu ni ekscias la esperantistan vivovojon de ĉi tiu eminenta ĉina E-aganto. Eble estus utile iam prezenti en la "Forumo" ideojn de sperta E-instruisto.

...sincere dirite, multe pli allogaj estas la ĉinaj temoj. Speciale interesis min la artikoloj pri la ĉina neŭrokirurgio, novaj ŝanĝigoj en la rilatoj de Taiwan kaj la kontinento de Ĉinio. Estas tre bone, ke la aŭtoro ne kaŝas malfacilaĵojn kaj problemojn en la rilatoj inter taiwananoj kaj la kontinentaj ĉinoj, la komenco estas tre optimismiga, kaj la artikolo per tio pli kredinda.

ANDRZEJ PETTYN
(Pollando)

ENHAVO

- 12 Ĉina-sovetia supera intervidiĝo
- 18 La hodiaŭaj Shu-vojoj (1)
- 6 Ĉinio inter la ŝipkonstruaj potencoj de la mondo
- 54 VOJAĜO LAŬ YANGZI-RIVERO (32):
Ŝanhajo, urbego kreita de Yangzi
- 16 LIBERA FORUMO DE EMINENTAJ E-ISTOJ:
Natura traduklingvo
- 28 SUR NIA LIBROBRETO:
Pri "Tibeto sur la Monda Tegmento"
- 29 POR KOMENCANTOJ:
Du antikvaj fabloj de Ĉinio
- 15 ESP-NOVAĴOJ
- 30 Ĉinaj robotoj
- 34 Ĉinio eliras el seksaj tabuoj
- 36 POR VIA SANO:
Korposanigaj metodoj (VIII)
- 49 ĈINA LITERATURO:
Wang Shifu kaj "La Okcidenta Ĉambro"
Elektita verko de Wang Shifu
- 44 INTERVJUOJ:
Lertulino pri silkaj homfiguroj
- 47 Sursceniĝis la ĉina antikva kortega muziko
- 23 LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (4):

- Tra krutaj gorĝoj
- 37 **Turismo en Pekino**
- 59 LA IMPERIESTRAL PALACO (4):
Tronejo en la palaco
- 41 Rejuniĝas kaverno
- 32 KURANTAJ AFEROJ
- 4 INTER NI
- 44 Kontribuu por la rubriko "Mi kaj Ĉinio"
- 33 Konkurso de scioj pri la nova Ĉinio okaze de ĝia 40-a datreveno
- 29, 36 KORESPONDI DEZIRAS

SUR LA KOVRILO:

Antikva ĉina danco en akompano de kortega muziko Foto de **HAI FENG**

INTERNE DE LA KOVRILO:

Kampananj domoj sur ebenaĵo

Foto de **MING YI**

Hangjiahu-ebenaĵo en norda Zhejiang-provinco estas parto de la delto de Yangzi-rivero, kun modera klimato, abunda pluvo kaj facila irigacio. La ebenaĵo, kiel grasa agrikultura regiono, estas produkitejo de greno kaj silko.

4 Bela floro Foto de **HAN XUEZHANG**

11 ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:

Dancado Pentraĵo de **ZHENG XIAOJUAN**


SUR LA DORSKOVRILO:

[ĈINAJ POŜTMARKOJ]

12 junaj nobelinoj

LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Sichuan-provinco
- 2. Dalian
- 3. Guyuan-gubernio
- 4. Shenzhen
- 5. Nankino
- 6. Harbin
- 7. Xi'an
- 8. Kantono



Ĉinio inter la ŝipkonstruaj potencoj de la mondo

La Dalian-a ŝipfarejo



Teksto de DA WEI
Fotoj de DIAO PEIQI kaj DA WEI



Wang Youwei (meze) sur ŝiplito



Veldado sur ŝipkorpo

LA 16-an de februaro 1989 la usona *Ĵurnalo de Komerco* publikigis informon, ke iu ĉina ŝipfarejo konstruis por norvega korporacio cisternoŝipon, kiu estas la plej granda el la ŝipoj faritaj de Ĉinio ĝis nun. La 118000-tonela naveda cisternoŝipo "Aiweita" estas projektita kaj konstruita de la Dalian-a Ŝipfarejo. La nomita ŝipfarejo famas tra la tuta lando pri konstruado de pli kaj pli grandaj ŝipoj.

Antaŭ dek jaroj la ĉinaj ŝipfarejoj estis neniom atentataj en la internacia merkato. Eĉ komence de la 80-aj jaroj, kiam la oceana transportado depreziis tra la tuta terglobo kaj multaj malnovaj ŝipfarejoj bankrotis, klientoj de diversaj landoj ankoraŭ ne volis aĉeti ĉinajn ŝipojn. Ĝuste en tiu tempo la Dalian-a Ŝipfarejo rezolute decidis konstrui eksportajn ŝipojn.

En 1982 ĝi konstruis la unuan ĉinan 27000-tonelan ŝipon por loza kargo. En la postaj 7 jaroj ĝi faris 17 ŝipojn kun totala kapacito de 620000 toneloj por mendantoj el 8 landoj kaj regionoj, kiu estis pli granda ol tiu en la antaŭaj 30 jaroj kaj

Putobora platformo



konsistigis kvaronon de la totala kapacito de la ŝipoj eksportitaj de Ĉinio en la 7 jaroj. La Dalian-a Ŝipfarejo la unua eniris en la internacian merkaton, kio finis la historion, ke Ĉinio ne povis konstrui eksportajn ŝipojn.

SERĈI ELIRON LAŬ LA REALAJ FORTOJ

En la frua printempo ĉi-jare, mi per trajno atingis la menciitan ŝipfarejon kun historio de 90 jaroj situantan en la suda parto de Liaodong-duoninsulo de nordorienta Ĉinio.

La ŝipfarejo el la orienta kaj okcidenta partoj kovras pli ol 1 500 000 kvadratajn metrojn kaj havas 15000 oficistojn kaj laboristojn. En la orienta parto, la malnova parto, estas kuŝejoj por ŝiplitoj de 60000-80000, 30000 kaj 7000 toneloj respektive. Ambaŭflanke de la kuŝejoj staras gigantaj turgruoj. Tiam oni konstruis 35000-tonelan kargoŝipon. Bruegis pneŭmatikaj ŝoveliloj, knaris ventoradoj kaj disŝprucis veldsparkoj inter ŝtalplatoj kaj pecoj de ŝipkorpo. La okcidenta parto, konstruita en la lastaj jaroj speciale por grandaj ŝipoj, havas unu kuŝejon por ŝipo de 100000 toneloj kaj unu albordiĝejon por ŝipo de 100000 toneloj. La 580-tuna gruo pli ol 100 metrojn alta staras transverse super la kuŝejo. Sur la supro de la gruo oni povas havi panoraman vidon de la ŝipfarejo.

Tuŝante la bazon de la ĉina ŝipkonstrua industrio, pli-ol-50-jara ĉefingeniero Luo konigis al mi, ke la ĉina ŝipkonstrua industrio kun historio de pli ol 3000 jaroj spertis prosperon, depresion kaj represeron. Ekde la 50-aj jaroj de la kuranta jarcento, la ĉina ŝipkonstrua industrio havis grandan progreson kompare kun tiu de la malnova Ĉinio, tamen ĝi ankoraŭ multe postigis post la avangarda nivelo de la monda ŝipkonstrua industrio, influate de la pordfermaj politikoj. Fine de la 60-aj jaroj, kiam Ĉinio ĝojis pro sia 10000-tonela ŝipo, evoluintaj landoj jam povis konstrui ŝipojn de pli ol centmil, eĉ de kelkcentmil toneloj.

En la pasintaj 30 jaroj la Dalian-a Ŝipfarejo konstruis ĉ. 2000 diversajn ŝipojn kaj posedis fortan vicaron de laboristoj. Taksinte siajn realajn fortojn, la ŝipfarejo faris la decidon kaj pendigis antaŭ la pordo grandan tabulon kun la slogano "Antaŭen al la Mondo".

Li daŭrigis, ke ŝipkonstruado estas facile influata de la prezo de laborfortoj. Unu el la kaŭzoj, kial depreziis la ŝipkonstrua industrio de la evoluintaj landoj en la lastaj jaroj, estas grandamplekse altigi la prezon de laborfortoj. La laborforta prezo de Ĉinio estas multe malpli alta ol tiu internacie. Ĝuste per malalta prezo la Dalian-a Ŝipfarejo malfermis la pordon de la internacia merkato.

KONSTRUI EKSPORTATAJN ŜIPOJN LAŬ INTERNACIAJ NORMOJ

La internacia ŝipmerkato tre atentis pri la kvalito de ŝipoj, iuj evoluintaj landoj fondis ŝipklasifikajn societon, ellaboris serion da ŝipkonstruaj normoj kaj subskribis internacian pakton. La Dalian-a Ŝipfarejo sufiĉe komprenis la gravecon de la internaciaj normoj, funkciigis diversajn kursojn, asimilis la internaciajn normojn kaj administrajn regulojn kaj renovigis multajn postgintajn ekipaĵojn. La unua 27000-tonela kargoŝipo ja estas konstruita tute laŭ la internaciaj normoj. La aĉetinto de tiu ŝipo, direktoro pri tekniko de la Hongkonga Liancheng-a Ŝipkompanio, taksis: "En la pasinteco, en Hongkong, Tokio kaj Usono multaj dubis pri la ŝipkonstrua nivelo de Ĉinio. Nun tiu reala ekzemplo povas konvinki la tutan mondon."


Tamen la laborantoj de la Dalian-a Ŝipfarejo ne kontentis pri la sukceso, ili senĉese pensas por atingi la avangardan nivelon de la internacia ŝipkonstruado. Por tiu celo ili kreas unu novan specon de ŝipo ĉiujare. Ili konstruis altklasajn ŝipojn, kiaj cilindra kargoŝipo, kemiaĵ-cisternoŝipo kaj naveda cisternoŝipo, surmaran putoboran platformon, modelan mason k.a., kaj tiel pligrandigis sian influon sur la internacia merkato.

En konstruado de altklasaj ŝipoj, kompreneble, ili renkontis multajn teknikajn malfacilojn. En 1986, dum konstruado de du 69000-tonelaj kemiaĵ-cisternoŝipoj por Norvegio, ili bezonis longan tempon por posedi specialan altklasan ŝmirteknologion por ŝirmi la ŝipkorpon kontraŭ korodo de kemiaĵoj. Tiam iu alilanda fakulo diris, ke probable tio povas prokrasti la konstruadon. La ŝipfarejo aĉetis tiun teknologion kaj necesajn ekipaĵojn per pli ol miliono da usonaj dolaroj kaj organizis taĉmenton por lerni la teknologion. Venkinte la malfacilojn, ĝi jam posedis ĝin en mallonga tempo kaj sukcesigis la konstruadon.

La Dalian-a Ŝipfarejo persistas en ŝipkonstruado laŭ la internaciaj normoj. La projektado de du eksportaj cisternoŝipoj baldaŭ plenumiĝos. Laboristoj emocie diris: "Ni neniam povus projekti altklasan grandan ŝipon, se ni ne konstruus ĝin." Pli ol 700 veldistoj de la ŝipfarejo akiris kvalifikitajn identigilojn pri veldado donitajn de la usona kaj brita ŝipklasifikaj societoj.

KAPTI SUKCESAJN FAKTOROJN EN RISKA DECIDO

Ŝipkonstruado estas riska entrepreno. Oni povas fali en malfacilan situacion, se oni perdas iomete da singardemo. Tial, ĝusta decido estas tre grava. Estro de la ŝipfarejo Wang Youwei povas esti rigardata



Projektado de ŝipkorpo


kiel prudenta kapablulo.

Li estas tre okupita. Iun vesperon, mi havis la ŝancon interparoli kun li. Laŭ la unua vido li, pli-ol-40-jara, diplomito de la Harbina milita inĝenieria Instituto, estas ordinara kaj milda. Tamen, lia lakona kaj logika parolo montris lian prudenton kaj decidemon. En kelkaj jaroj post lia estriĝo la ŝipfarejo spertis plurajn riskojn kaj konstruis 69000-tonelan kemiaĵ-cisternoŝipon, 115000- kaj 118000-tonelajn navedajn cisternoŝipojn.

La 11-an de januaro 1987, kiam la 115000-tonela cisternoŝipo estis preta por esti lanĉita, alilanda ŝipkontrolisto diris, ke li ne kontentas pri ĝia ankrado, kaj postulis riparon. Tiam, regis malbona vetero kaj urĝis la tempo. Riparado povis prokrasti la lanĉadon aŭ nuligi la kontrakton pri la ŝipo en valoro de pli ol 30 milionoj da usonaj dolaroj. Wang Youwei kaj aliaj teknikistoj, post serioza analizo, firme decidis unue lanĉi kaj poste ripari ĝin sub la premo de sekureco. Je la dudeka kaj kvardek minutoj de la 20-a ambaŭ flankoj subskribis la kontrakton pri la ŝipo sur la ondeganta maro. Tiam restis nur 3 horoj kaj 15 minutoj antaŭ la difinita tempo por nuligi la kontrakton.


Tion dirinte, Wang emfaze montris, ke la Dalian-a Ŝipfarejo ŝuldis la atingojn akiritajn en la lastaj 10 jaroj al siaj oficistoj kaj laboristoj. Oni povas diri, ke ili malfermis vojon al la eksportado de ĉinaj ŝipoj kaj akumulis iom da spertoj por altigi la ŝipkonstruan nivelon de Ĉinio.

Nun, pli ol dek ŝipfarejoj sub la Ĉina Ŝipindustria Kompanio konstruas eksportajn ŝipojn. Ĝis la fino de 1988 Ĉinio eksportis diversajn ŝipojn kun totala kapacito de 2500000 toneloj, i.a. la jara produktokvanto de ŝipoj, kiu antaŭe restis ĉe aŭ post la 15-a loko, nun okupas la 6-an en la mondo. La leviĝo de la ĉina ŝipkonstrua industrio altiras la atenton de la ŝipkonstruaj landoj.



118 000-tonela naveta cisternošipo lančota

Špruclakado de šipkorpo



Dancado

Mjaŭ-oj vivas ĉefe en sudokcidenta Ĉinio. Multaj el ili loĝas en la provinco Guizhou (Gujōu). Ili ŝatas danci kaj kanti kaj portas malsamajn kostumojn en malsamaj lokoj. La virinoj, kun hartubero kaj kaptuko, portas bluzon kun larĝa kolumo kaj plisitan jupon kun bela kovro kaj kelkfoje kun arĝentaj ornamoj.

Pentraĵo de ZHENG XIAOJUAN

Mjaŭ-oj en iuj lokoj ĉiujare okazigas aktivadon por dancado kaj taŭrbatalo. En dancado gejunuloj starigas amrilaton inter si.



Ĉina-sovetia supera intervidiĝo



Deng Xiaoping intervidiĝas kun M. Gorbaĉov en la Popola Halo.

JE la dekdua horo de la 15-a de majo 1989 aeroplano IL-62 alteriĝis en Pekino. Per ĝi venis al Ĉinio M. Gorbaĉov, prezidanto de la Prezidio de la Supera Soveto de Sovetunio kaj la ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Sovetunio. Invitite de Yang Shangkun, prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, li alvenis por fari 4-tagan oficialan viziton en Ĉinio. Kiam M. Gorbaĉov kaj lia edzino ridetante descendis la aeroplanon, prezidanto Yang kaj aliaj ĉinaj gvidantoj intime kaj varme lin bonvenigis.

Ĉinio kaj Sovetunio estas najbaroj, kies loĝantaroj konsistigas kvaronon de la tuta loĝantaro de la mondo. Ili estas influhavaj potencoj en la mondo. Inter ili etendiĝas landlimoj de 7000 km. En la lastaj 40 jaroj la rilatoj inter la du landoj iris zigzagan vojon. En la 50-aj jaroj ili alianciĝis, sed neniam vidigis kontraŭdirojn kaj malakordojn inter si. Tio fakte estis supraĵa fenomeno, ke la akorda flanko kovris la malakordan.

En la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj la kontraŭdiroj kaj malakordoj evidentiĝis, rapide eskaladis kaj fine rompiĝis la ŝtataj interrilatoj kaj estiĝis serioza politika kaj milita malpaciĝo. Tio sendube ne estis beno por la du popoloj, nek favoro al la paco kaj disvolvi-



Knabino prezentas bukendon al M. Gorbačov.



Raisa, la edzino de M. Gorbačov, donacas metiartaĵon al Zhang Wenjin, prezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj.

ĝo de la mondo, precipe de Azio.

La nuna internacia situacio draste ŝanĝiĝis. Antagonismo cedis al interparolo, streĉiĝo al mildiĝo — jen internacia tendenco. La normaligo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Sovetunio sekvas tiun tendencan. De la okdekaj jaroj la rilatoj inter la du landoj iom post iom mildiĝis, ĉefe en komerco kaj kultura interŝanĝo. En tiu tempo la ĉinaj gvidantoj esprimis deziron okazigi superan intervidiĝon, kondiĉe ke Sovetunio antaŭ ĉio forigu tri barojn, kia la problemo de Kamboĝo kaj la problemo de Afganio. Poste ankaŭ la sovetiaj gvidantoj esprimis la saman deziron.

Nun maturiĝis la kondiĉoj kaj fine okazis la supera intervidiĝo de la du landoj. Tio estas natura sekvo de la disvolviĝo de la afero.

La 16-an de majo intervidiĝis

prezidanto M. Gorbačov kaj Deng Xiaoping (Deng Ŝjaŭping), prezidanto de la Milita Komisiono de CK de KPĈ, intervidiĝis kaj interparolis kun Zhao Ziyang (Ĝaŭ Zijang), ĝenerala sekretario de CK de KPĈ, kaj Li Peng, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro. Ili interŝanĝis opiniojn pri la rilatoj inter la du landoj kaj aktualaj internaciaj problemoj. Ĉi-foja intervidiĝo markis la normaligon de la rilatoj inter Ĉinio kaj Sovetunio, sekve ankaŭ tiun inter la du partioj. Ĉinio kaj Sovetunio finis la 30-jaran malakordon inter si kaj enskribis novan paĝon en la historion.

La normaligo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Sovetunio celas neniun trian landon, nek damaĝas la interesojn de aliaj landoj nek influas Ĉinion kaj Sovetunion en iliaj rilatoj kun aliaj landoj. Tio konformas al la deziro de ambaŭ

popoloj de Ĉinio kaj Sovetunio kaj al tiu de la popoloj de la tuta mondo. La normaligo utilas al la stabileco kaj evoluo de Azio kaj la pacifika regiono kaj al la paco kaj sekureco de la mondo.

La 18-an de majo Ĉinio kaj Sovetunio publikigis komunan komunikadon. La komunikado resumis la atingojn de la intervidiĝo. La komunikado emfazis novtipajn rilatojn inter Ĉinio kaj Sovetunio surbaze de universalaj principoj, nome reciproka respekto de suvereneco kaj teritoria integreco, reciproka neinvado, reciproka neinterveno en internajn aferojn, egaleco kaj reciproka utilo, kaj paca kunezisto. Kelkdek-jara praktikado en internaciaj rilatoj post la milito pruvis, ke la kvin principoj por la paca kunezisto estas efika por trakti internaciajn aferojn. Ĝi taŭgas ne nur por landoj de malsamaj reĝimoj, sed ankaŭ



M. Gorbačov kaj ĉinaj intelektuloj



M. Gorbačov kaj lia edzino Raisa sur la Granda Muro

por la landoj de sama reĝimo. La principoj spertis longan provon kaj pruviĝis plej vivipovaj. La rilatoj inter Ĉinio kaj Sovetunio povos disvolviĝi stabile kaj sane, se nur la du landoj vere observos la kvin principojn por la paca kunekzisto. Koncerne la interpartiajn rilatojn, oni povos normale kaj stabile antaŭenpuŝi ilin surbaze de kvar principoj, t.e., sendependeco, plena egaleco, reciproka respekto, reciproka neinterveno en internajn aferojn.

La komunikaĵo deklaris, ke neniu el Ĉinio kaj Sovetunio ĉasas hegemonion en ajna formo en Azio, pacifika regiono kaj aliaj lokoj de la mondo kaj oponas kontraŭ ajna lando ĉasanta hegemonion en ajna loko kaj en ajna formo. En la nuna mondo hegemoniismo, ĉu tutgloba, ĉu regiona, jam havas nenian bonan reputacion kaj bankrotas aŭ baldaŭ bankrotos. Se ĉiuj landoj praktikos la kvin principojn por la paca kunekzisto en traktado de internaciaj aferoj, ne ĉasos hegemoniismon nek potencan politikon, do la

mondpaco estos garantiata kaj nova ordo de internacia politiko iom post iom stariĝos. Ĉinio fidas al la kvin principoj de la paca kunekzisto, sendevie praktikos la sendependan pacan politikon en eksteraj aferoj, oponos kontraŭ hegemoniismo, defendos la mondpacon kaj faros kontribuojn al la paco, disvolviĝo kaj progreso de la homaro.

Dum la intervidiĝo ambaŭ flankoj interŝanĝis opiniojn pri problemoj alfrontataj de socialismo. Nun socialismo renkontis seriozan defion. Reformado estas ĝia ununura elirejo. Faktoj montras, ke socialismo ne estas de unu sola ŝablono. La marksisto-leninistoj de diversaj landoj devas konstrui sian socialismon laŭ la konkretaj kondiĉoj de sia lando. Tio helpos daŭrigi, riĉigi kaj evoluigi Marksismo-Leninismon per novaj pensoj dum praktikado kaj doni novan impulson al la socialisma afero.

La normaligo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Sovetunio estis gajnita

ne facile. Hodiaŭ dank' al la kuna penado de ambaŭ landoj la forigo de baroj por normaligi la rilatojn inter la du landoj faris efektivan paŝon. La normaligo de la rilatoj ankaŭ akcelos novan disvolviĝon en la rilatoj de politiko, ekonomio, komerco, scienco, tekniko, kulturo k.a. Sed la baroj ne estas komplete forigitaj, precipe la problemoj de Kamboĝo ne estas tute solvita kaj atendas pluan penadon. Sovetunio ja povos fari pluan penadon tiurilate. Ĉinio esperas, ke Sovetunio faros efikan penon por sukcesigi justan kaj racion solvon de la problemoj de Kamboĝo por forigi la ombrojn sur la rilatoj inter la du landoj kaj mildigi la streĉan situacion de sudorienta Azio.

Dum sia restado en Pekino M. Gorbačov vizitis la Grandan Muron, faris paroladon al personoj de akademiaj rondoj kaj interparolis kun junuloj. Li vizitis Ŝanhajon, la plej grandan urbon de Ĉinio. Li estis varme bonvenigita en Ĉinio. Antaŭ la adiaŭo li diris, ke li estas tre kontenta pri tiu ĉi vojaĝo kaj intervidiĝo. ■

ESP-NOVAĴOJ

● De la pasinta jaro ĝis junio de 1989 Ĉinio eldonis 14 specojn de libroj, kiuj konigas Esperanton, Zamenhof, UEA kaj famajn ĉinajn esperantistojn. Inter tiuj libroj estas "Granda Han-lingva Vortaro", "Konciza Britia Enciklopedio" (ĉinlingva), "Porinstruista Enciklopedieto", "Vortaro pri Sociaj Sciencistoj", "Sovetia Enciklopedieto" (ĉinlingva), "Vortaro pri Poemoj", "Konciza Vortaro pri Sociaj Sciencoj", "La Plej-oj", "Jarlibro de Mondaj Aferoj, 1987", "Lingva Enkonduko".

● En la unua duonjaro de 1989, la Ĉina E-Eldonejo aperigis 8 novajn librojn: "5000 Jaroj de Ĉinio", "Aventuro de Ĉasisteto dum Ekspediciado", "Antikvaj Filozofoj de Ĉinio", "Kamelo Ŝjangzi", "Grandaj Pandoj — Brilaj Steloj", "Bestidoj kaj Iliaj Patrinoj", "Malgranda Rano Flugis kaj Falis" kaj "Faktoj kaj Fantazioj" verkita de Marjorie Boulton, brita fama verkistino.

● Ekde marto 1989 Yuxi-a Agrikultura Kolegio oficiale funkciigas nedevigan E-kurson unu-jaran. En ĝi lernas 50 kursanoj po 2 horojn semajne.

● Por akceli la kulturajn interŝanĝojn inter Ĉinio kaj Japanio kaj amikecon inter ĉinaj kaj japanaj esperantistoj, s-ro Satoo Ŝooĉi, vicestro de la Japana Nord-Orienta Esperanto-Ligo, vizitis la urbon

Zhanjiang (Gangĝang), de la 25-a ĝis la 28-a de marto, invitive de la Zhanjiang-a Esperanto-Asocio, Guangdong-provinco. La gastigantoj okazigis kunvenon por bonvenigi s-ron Satoo Ŝooĉi. En la kunveno ili reciprokis donacojn. La japana samideano vizitis la Leizhou-an Normalan Kolegion, la Unuan Mezlernejon de Zhanjiang kaj faris prelegon por la instruistoj kaj lernejanoj. Tion raportis la lokaj televidstacio kaj ĵurnalo.

● La Tibeta Poŝtmarka Kompanio uzis poŝtstampilon de Lhasa pejzaĝo en la lingvoj han-a, tibeta kaj Esperanta. Ĝi, projektita de veterana esperantisto Zhang Linrui (Gang Linĵuj), estas la dua poŝtstampilo en Esperanto sur la Monda Tegmento.

● Ĉe Montgrimanta Asocio de Jugoslavio funkcias ankaŭ Esperanto-sekcio: "Esperanto sur Monto" kadre de Montgrimanta societo "Runolist" en Sarajevo. La sekiestro Smail Grbo, ankaŭ montaramanto, bone propagandas Esperanton ĉe montar- kaj naturamiko. En aprilo li gvidis intensivan E-kurson por montaramantoj en la urbo, en majo ankaŭ tiun konversacian en montaro, kaj fine de junio la sekcio organizis viziton al montaro Tatre en Pollando kunlabore.

● Okaze de la 40-jara fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, Amikoj de Esperanto (s-ro Jozef DUDAŠ, Miškolec-23, Pf-100, H-3523, Hun-



La pejzaĝa poŝtstampo de Lhasa

gario) okazigos ekspozicion de E-libroj kaj gazetoj, precipe El Popola Ĉinio. Do, ili serĉas la mankantajn numeroj por kompletigi ĉinan materialon. Al ili mankas numeroj de EPĈ inter 1950-1978, escepte tiujn de la jaroj 1952, 1963, 1965. Ili havas ankaŭ duoblajn ekzemplerojn (ĉ. 850) de EPĈ.

Ili petas urĝan reagon kaj proponas kunlaboron por estonto!

● Inter la 30-a de marto kaj 4-a de aprilo 1989 en Bad Saarow okazis Internacia Junulara E-Seminario. Ĝin partoprenis 30 gejunuloj el 5 landoj (Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Bulgario kaj GDR), kiuj reprezentis 7 diversajn E-junularajn organizojn. En la diskutoj kaj prelegoj ili ĉefe traktis la nunan situacion en la diverslandaj E-junularaj organizoj kaj la eblecon por pli efika kunlaboro sur diversaj kampoj. En la aranĝo oni prelegis ankaŭ pri la strukturo en la internacia E-movado, pri la uzo de Esperanto en scienco kaj tekniko, pri Zamenhof, E-poemoj, DLT, instruado per amuzaj vortludoj ktp.

S-ro Satoo Ŝooĉi (la dua de maldekstre) en Zhanjiang



Instruisto Smail Grbo kun siaj "kolombidoj" festas la 15-jariĝon de "Kolombo".




NATURA TRADUKKLINGVO

de WILLIAM AULD* (Britio)

LA fakto, ke nia lingvo Esperanto ne havas nacian kulturbazon, estas kelkfoje citata (de neesperantistoj), kvazaŭ ĝi estus malavantaĝo, eble eĉ mortiga por niaj pretendoj. Fakte ĝi estas grava avantaĝo, tute precipe sur la kampo de literatura tradukado. Mi konstatas, ke ĝuste sur tiu kampo la ceteraj lingvoj estas eble eĉ tro forte **ligitaj** al sia nacia kultura tereno! Kompreneble, se mi pravas, tio ne estas nepre malbona afero; sed ĝi klare montras, ke la rolo de nacia lingvo estas difinita de la nacikulturaj kadroj, kaj ke ekster tiuj kadroj ĝi estas laŭnature malpli kompetenta.

Mi ne scias, ĉu mi sukcesos komprenigi al la legantoj mian senton, sed mi volas provi. Sciu, ke la angla estas mia nacilingvo, kaj Esperanto estas mia “alia unua” lingvo; nome, mi posedas ilin pli-malpli egale. La literaturon mi studas, kaj studis dum preskaŭ la tuta vivo, pere de ambaŭ lingvoj. Tio inkluzivas, kompreneble, multajn centojn de tradukaĵoj.

En angla lingvo troviĝas multaj tradukoj, kiuj legiĝas bonege en la angla. Mi rimarkis tamen, ke tiuj estas senescepte verkoj tradukitaj en la anglan de homoj, kies unua kaj ĉefa lingvo estas la traduklingvo, la angla. La tradukoj, sekve, (nome la plej sukcesaj) alprenas patinon de natura angleco kaj legiĝas pli-malpli kvazaŭ originale verkitaj en la angla. Oni rajtas eĉ pretendi, ke tia alproprigo signalas sukcesan tradukon, kaj certe la prijuĝo “la verko legiĝas kvazaŭ traduko” estas konsiderata kiel kondamno. Sed ĉu eble perdi-



La aŭtoro

ĝis io, kio apartenas al la originalo, nome ĝia nacikultureco?

Mi ankaŭ ricevas el eksterlando tradukojn en la anglan pretigitajn kaj distribuatajn de eldonejo (ofte ŝtata) en la koncerna lando. Plej ofte tiuj ne estas tradukitaj de indigenaj angleparolantoj, sed de homoj unuavice vivantaj en la tiulanda kulturo — kvankam ilia kompetenteco pri la angla lingvo supozigas, ke ili pasigis sufiĉe multe da tempo en anglalingva teritorio. Ne nur librojn mi ricevas, sed ankaŭ literaturajn revuojn, kaj mi volas atesti, ke ĉion mi legas kun granda intereso kaj plezuro. Tamen mi tre ofte rimarkas — mi neniu volas ofendi — ke ties angla lingvo estas iel “fremda”.

Ne temas pri tio, ke ĝi estas malkorekta, aŭ malbela, aŭ miskompreniga. Tute ne. Temas pri tio, ke ĝi legiĝas neangle. La uzita vortprovizo estas larĝa kaj trafa, la gramatiko estas senripoĉa, tamen oni ofte sentas, ke denaska (kaj eventuale unulingva!) angleparolanto ne skribus tion — fakte, **ne havus okazon skribi tion**, ĉar la konceptoj mem estas iel fremdaj al la anglalingvaj medioj. Kompreneble. Ni scias tute bone, ke la naciaj kulturoj diferencas inter si. Anglulo kaj (ni diru) Ruritanio malsamas politike, historie, ekonomie, socie — kaj kompreneble la koncernaj lingvoj spegulas tion. Anglo, kiu tradukas el la ruritania, estas lojala unuavice al la angla kulturo, kaj angligas lingve sian tekston, dum la ruritaniano lojals

unuavice al la kulturo ruritanian, kaj lia angla lingvo spegulas tion. Kiu traduko preferindas? Tio dependas de la vidpunkto.

Ripetante, ke mi neniun volas ofendi, mi tamen riskas doni unu ekzemplon, elektitan pli-malpli hazarde, ĉar ĝeneralajoj sen ekzemploj ne estas tute fidindaj. Mi lasas mian fikcian Ruritanion, kaj min turnas al lando kaj eldonejo, kiujn mi profunde respektas kaj eĉ dankeme amas, nome al Ĉinio, kaj al unu elstara aŭtoro, kies verkojn mi admiras jam de 38 jaroj, nome Lusin.

Malfermante anglalingvan volumon, mi trovas:

“When she uttered this wordless cry, her whole body, great as a statue but already wasting and degraded, was shaken by tremors. These tremors, small and distinct at first as fish-scales, started seething like water over a blazing fire; and at once the air too was convulsed like waves in the wild, storm-racked ocean. Then she raised here eyes to the sky, and her wordless cry was swallowed up in silence. Only her tremors, radiating like sunbeams, set the waves in the air whirling round as if in a cyclone to sweep headlong across the illimitable wasteland.”

Tiu lingvaĵo estas korekta, kaj eĉ vere eleganta — kio certe spegulas la originalajn karakterizojn — sed mi ne atendus legi tion en verko originale verkita en la angla.

Ŝajnas al mi do, ke pere de la angla lingvo mi devas elekti inter tradukoj poluritaj kaj laŭeble anglecaj, kaj tradukoj, kiuj malgraŭvole emfazas la fremdecon de la originaloj. Kvankam mi legas ambaŭ kun plezuro kaj dankemo, neniun el ambaŭ plene kontentigas miajn dezirojn kaj kriteriojn. Mi preferas tradukon, kiu sentigas la apartecon de la koncerna kulturo sed ne sentigas ĝin fremda al mia fundamenta homeco. La sola lingvo, kiu kapablas tiun peradon, estas kompreneble Esperanto.

Ni rigardu nian citaĵon el Lusin en ties esperanta vesto:

“Kiam ŝi eligis la senvortan parolon, ŝia tuta korpo, kiu estis granda kiel ŝtonstatuo, sed jam dezertigita kaj kaduka, tremis. Ĉiu punkto de la korpo tremis kvazaŭ fiŝskvamaro, ĉiu skvamo levigis kaj mallevigis kvazaŭ bolanta akvo super arda fajro; kaj kune kun ĝi tremis la spaco kiel ondaro de dezerta maro en tempesto. Tiam ŝi levis siajn okulojn al la firmamento kaj silentigis eĉ la senvorta parolo, restis nur la tremado, kiu disvastiĝis kiel sunradioj kaj igis la ondaron en la spaco ekkirliĝi kvazaŭ sub uragano, ondadi ŝaŭmante tra la senlima dezerto.”

Oni pardonu al mi se mi diras, kiel dulingvulo, ke tiu teksto ŝajnas al mi pli **natura** ol la angla teksto, kaj en neniun senco malsupera al tiu lasta.

Kion pravas al mi mia tezo? — ke la lingvo Esperanto, pro sia manko de nacia kulturbazo, kapablas alproprigi kaj diskonigi la karakterizojn de ĉiuj naciaj kulturoj,

ne samtempe fremdigante ilin por la leganto. Tial ĝi estas pli fidenda kaj kompetenta literatura tradukilo ol la aliaj lingvoj!

Mi povis konfirmi tiun tezon jene: mi pli ol unufoje malfermis tradukon en Esperanto el la...ruritanian, tekston, kiu tre plaĉis al mi, kaj provis mem angligi ĝin. Tre baldaŭ la fremdeco trudiĝis al mi de teksto, kiu en Esperanto varmigis mian koron per siaj homecaj kvalitoj.

Ni konsentu, ke la nacilingvoj spegulas la naciajn kulturojn, ĉar tio estas ilia natura tasko. Ni konsentu, ke la diversaj naciaj kulturoj estas fenomeno ŝatinda kaj dezirinda. Eble ni tamen konsentu ankaŭ, ke transcendas ilin neŭtrala kulturo, kiu sentigas la fratecon de la homa raso, kaj ties natura lingvo estas Esperanto. ■

*Fama poeto, iama redaktoro de “Esperanto en Skotlando”, “Esperanto” de UEA, “Monda Kulturo” kaj “Norda Prismo”, redaktoro de “La Brita Esperantisto” kaj “Fonto”, vicprezidanto de UEA (1977-1980), prezidanto de la Akademio de Esperanto (1979-1983).

La peranto de “EL POPOLA ĈINIO” en Venezuelo

Samideano

DAVID G. VALECILLOS V.

Calle 79 No. 3C-72

MARACAIBO-4002. VENEZUELO

bonvenigas ankaŭ abonkotizojn en ĉiuj latinamerikaj landoj, en kiuj ne estas perantoj de ĉi tiu revuo.

BONVENON AL ABONANTOJ DE “EL POPOLA ĈINIO” EN LATINAMERIKO!

La hodiaŭaj Shu-vojoj (1)

Teksto de WEI LIAO

Fotoj de LIU SIGONG

SHU estas alia nomo de Sichuan-provinco, kie vivas cent milionoj da loĝantoj. Meze de la provinco estas vasta ebenaĵo. De antikve la tiea trafiko estis maloportuna. Eĉ en la 40-aj jaroj de la 20-a jarcento nur Yangzi-rivero kaj kelkaj ŝoseoj kondukas de tie al aliaj provincoj, tial Shu-vojoj fariĝis sinonimo de malfacilo kaj danĝero. En la frua somero mi speciale vizitis la provincon kaj notis miajn

spertojn.

Por mi Shu-vojoj estis bela sonĝo. La ekspreso de Pekino al Chengdu portis min sur la elektran Baoji-Chengdu-an Fervojon en la noktomezo. En ĝojiga bruado de la vagonaraj radoj mi dronis en dolĉa sonĝo. Vekiĝinte, mi trovis, ke la trajno jam atingis la Chengdu-an Ebenajon.

Por Li Bai (701-762), fama poeto de Tang-dinastio (618-907), la Shu-vojoj estis tamen tragika kaj impona poemo.

En la antikveco en Sichuan nur kelkaj mallarĝaj vojoj kondukis al aliaj lokoj. Ĉirkaŭ Sichuan-baseno kun Chengdu-ebenaĵo kiel la centro staras la montaraj Daliang, Qionglai, Daba, Wushan kaj Dalou, kiuj estas 1000-3000 metrojn

La Baoji-Chengdu-a Fervojo, la unua ĉina elektrizita fervojo





Shu-vojoj

Foto de LI YOUCHENG

altaj super la marnivelo. Yangzi-rivero fluas en Sichuan, breĉinte Wushan-monton, daŭrigas sian iradon orienten kaj formis Tri Gorgojn belajn, mirindajn kaj danĝerajn. Estis malfacile por la antikvuloj iri en kaj el Sichuan. Ili devis transiri aŭ majestajn montojn aŭ danĝerajn riverojn. Tial, sur danĝera Shu-vojo poeto Li Bai suspiris:


*“Ve! ho, ve! Kiel kruta kaj danĝera!
La vojo al Shu estas pli peniga
ol la vojo alĉiela!”*

SHU-VOJOJ HODIAŬ

Hodiaŭ la Shu-vojoj ne plu estas sinonimo de malfacilo kaj danĝero. Ĝia signifo jam radikale ŝanĝiĝis.

Norde la antikva Jinniu-vojo de Shaanxi-provinco al Sichuan estas jam anstataŭita de la Baoji-Chengdu-a Fervojo. Qingxi-vojo de Chengdu, la ĉefurbo de Sichuan-provinco, al Kunming de Yunnan-provinco estas anstataŭita de la Chengdu-Kunming-a Fervojo. Ankaŭ la antikva poŝta vojo de Chengdu al Chongqing estas anstataŭita de fervojo. La fervojoj ligas Sichuan ankaŭ kun Hubei kaj Guizhou. Krome interne de la provinco funkcias 9 fervojoj. Nun

SKEMA MAPO DE SHU-VOJOJ



la fervojoj en Sichuan-provinco, ligantaj 50 guberniojn kaj urbojn, entute longas 2877 kilometrojn.

En la provinco estas ŝoseoj de 99 000 kilometroj, kiuj kovras preskaŭ ĉiujn antikvajn vojojn kaj formis ŝosean reton, kiu ligas 215 guberniojn. Ĝia totala longeco konsistigas 1/10 de tiu de la tuta lando.

Krome, en la provinco ankaŭ flugas pasaĝeraj aviadiloj al ĉiuj grandaj kaj mezgrandaj urboj de la lando kaj navedas ŝipoj sur Yangzi-rivero.

Shu-vojoj jam disvolviĝis en modernan trafikan reton, fierindan por la tieaj loĝantoj.

SONĜO DE SHU-REĜO

Por sperti la malfacilon sur la antikvaj Shu-vojoj mi speciale veturis al la urbo Guangyuan najbare de Shaanxi-provinco. Tie mi forlasis komfortan trajnon kaj por serĉi postsignojn de la antikvaj vojoj, prenis aŭton, kiu tange kuris sur la Sichuan-Shaanxi-a Ŝoseo.

La Sichuan-Shaanxi-a Ŝoseo direktiĝas fundamente laŭ la antikva Jinniu-vojo. Por la reĝo de Shu-regno la vojo estis tragedio. Oni diras, ke en la periodo de Militan-

taj Regnoj (475-221 a.K.) la reĝo Hui de Qin-regno jam delonge avidis la riĉan Sichuan-basenon, sed ne povis marŝi tien pro barado de la montoj. Poste, la reĝo Hui mensogis, ke li sendos kvin belulinojn kaj kvin orajn bovojn al la reĝo de Shu-regno. Tiu lasta, avida je mono kaj volupto, estis superruzita. Por bonvenigi la belulinojn kaj orajn bovojn, li speciale malfermis Jinniu-vojon (Jinniu signifas oran bovon). Tial la armeo de Qin marŝis antaŭen laŭ tiu vojo kaj pereigis Shu-regnon.

En Jiange-gubernio de Guangyuan kuŝas antikva kornica vojo, longa je 50 kilometroj. Oni diras, ke ĝuste laŭ tiu vojo la armeo de Qin marŝis al Shu-regno siatempe. La ondanta Dajian-monto pli kaj pli altiĝas de sude norden, sed ĉe la pinto ĝi abrupte malleviĝas. Rigardante supren de norde suden oni vidas 72 montopintojn similajn al spadoj ĉielpikantaj. Tie estas sola montvojo Jianmen-pasejo.

Tiutempe, granda poeto Li Bai verkis versojn:

*“Jiange minace kiel tur’ la vojon
baras,
Dekmil ne povus ĝin trarompi,
Se unu viro gardostaras.”*

Dank’ al la poemo de Li Bai Jianmen-pasejo famis centojn da jaroj. Tamen hodiaŭ trajnoj kaj aŭtoj rapide kuras tie.

SICHUAN-SHAANXI-A ŜOSEO

Ni aŭte veturis por daŭre serĉi postsignojn de la antikvaj Shu-vojoj. Proksime al la natura baraĵo Qingfeng-gorĝo, subite mi vidis, ke kelkaj kamparanoj kuras antaŭen plorante. Kiam nia aŭto atingis la lokon mi trovis, ke junulino svene kuŝas ĉe rado de ŝarĝaŭto kaj sango fluas el ŝia pantalono. La akcidento-kaŭzinto, mezaĝulo kun pala vizaĝo, ion klarigis al la ĉirkaŭantoj. S-ro Zhao, mia akompananto, diris al mi, ke sur la ŝoseo



Produktolinio de koloraj televidiloj en Changhong-maŝinfabrika
Foto de SHEN RONG



La aŭtoro (dekstre) intervjuas trajnestron sur ŝu-vojo.

en Guangyuan, ofte okazis trafikaj akcidentoj pro la ŝosea mallarĝo kaj la terena danĝero.

Menciinte la trafikajn akcidentojn ekvigligis nia ŝoforo. Li vive rakontis al mi pri la trafikaj akcidentoj okazintaj en tiu regiono. Tio tiel maltrankviligis min, ke mi firme kaptis la tenilon de la aŭtopordo por ke mi povu tuj elsalti el la aŭto ĉe la akcidento.

De Guangyuan ni daŭrigis nian veturadon suden kaj atingis Mianyang. Nur tiam mi ektrankviligis, ĉar tie la ŝoseo estas pli bonkvalita dank' al la plilarĝigo kaj riparado. La urbo Mianyang bone impresis min.

URBO DE ELEKTRONIKA INDUSTRIO

En la urbo Mianyang arbare staras altaj domoj kaj bonorde kuŝas larĝaj stratoj. En la urbomezo vidigas granda tabulo kun okulfrapaj vortoj "Elektronika Strato Changhong", kiu montras la industriajn trajtojn de la urbo.

Nur en la lastaj jaroj Mianyang estis honorita kiel "nova urbo de elektronika industrio". Nun tie funkcias pli ol 20 elektronikaj entreprenoj kun 20000 laborantoj,

kies jara produktovaloro konsistigas 1/4 de la totala industria produktovaloro de la tuta urbo kaj estas rigardata kiel grava ekonomia parto de Mianyang. En tiu elektronika urbo estas avangardaj scienc teknikaj kaj produktaj fortoj. Ĝi produktas kaj elektronikajn maŝinpartojn kaj aparatojn de elektra terapio kaj sonregado, komunikajn ekipaĵojn de radaroj kaj submarajn kablojn.

La fama Changhong-maŝinfabrika povas grandnombre produkti aer-portajn radarojn precizajn kaj kompleksajn kaj diversspecajn bonkvalitajn televidilojn. En 1988 ĝia totala produktovaloro superis 700 milionojn da juanoj.

La rapida disvolvigo de la elektronika industrio en Mianyang nedisigeblas de la disvolvigo de la trafiko. Antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio, en Mianyang estis nek fervojo nek normala ŝoseo, tiam ekzistis nur nenormala ŝoseo longa 300 kilometrojn. En 1949 la totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo de la tuta urbo egalas nur 1/2 de la produktovaloro de Changhong-maŝin-fabrika en 1988.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, multe ŝanĝigis la trafiko en Mianyang. Sole en la lastaj dek jaroj oni konstruis ŝoseon longan je 1 658

kilometroj, kiu ligas 32 distriktojn. Nun, la ŝoseoj en Mianyang entute longas 5140 kilometrojn. Tiuj ŝoseoj kune kun la Baoji-Chengdu-a Fervojo kaj Fujiang-rivero formis oportunan trafikan reton.

ŜOSEOJ INTER MONTVILAĜOJ

En longaj jaroj mankis ŝoseo en Yuli-distrikto, Beichuan-gubernio, Mianyang. Nuboj kaj nebulo ĉiam vualis la lokon en profunda montaro.

Januaron de la kuranta jaro, finfine aperis serpentuma ŝoseo antaŭ la tieaj loĝantoj. Preskaŭ ĉiuj montvilaĝanoj partoprenis en la ŝoseo-konstruado kaj estis rekompenctaj parte per mono kaj parte per ordinaraj industriaj produktaĵoj. Tia rekompensa metodo estas utila provo de la ŝtato por kiel eble plej rapide liberigi la montvilaĝanojn el malriĉeco. Nun en Beichuan-gubernio la ŝoseoj sin etendis al ĉiuj distriktoj.

Ĉe la fino de la ŝoseo al Yuli-distrikto, mi elaŭtigis kaj vidis malnovan ŝtipkabanon ĉe la vojo. Malantaŭ la kabano mi trovis dommastron, kiu hakis lignon. Li estis forta mezaĝulo. Li kun rideto salutis min.

Tiu viro estas etvendisto. La antaŭa mallarĝa montvojeteto, kiu kondukis al la ekstera mondo, multe korodis liajn forton kaj kur-aĝon. Li plukis drogherbojn kaj vendis ilin en la urbeto. Foje li atingis Chengdu, kiu estis sufiĉe malproksima por li. Li devis pied-iri du tagojn laŭ montvojeteto al la gubernia urbo, de tie aŭte veturi al Mianyang kaj de Mianyang per trajno veturi al Chengdu. Ĉiujare li klopodis unu aŭ du monatojn aliloke kaj akirinte mil juanojn, li hejmenrevenis por vivi kun siaj edzino kaj infanoj. Li diris, ke li laboras sole por vivtenado.

“Nun estas ŝoseo. Ĉu vi ne volas iri pli malproksimen por pli granda komercado?” mi demandis.

“De kie vi venis?” radiante de gojo, li demandis.

“De Pekino.”

“Pekino?” li miris kaj post momenta silento diris: “Mi do vendos la drogojn en Pekino.”

Mi ne scias, ĉu li vere vendos drogojn en Pekino aŭ ne. Tamen mi estas certa, ke li pli foren iros ĉi-jare, ĉar la nove pavimita vojo jam vekis ĉe li novan esperon.

Mi pensis, ke li certe revas pli multe. ■



Lokaj produktaĵoj transportotaj aliloken



Foiro en urbeto

Parto de la urbo Mianyang

Foto de SHEN RONG



TRA KRUTAJ GORĜOJ

Teksto de XU YE kaj WANG QINGHUA

Fotoj de XU JINYAN

DE Chengdu-ebenaĵo okcidenten la Suda Silka Vojo etendiĝas en montaron. Tie, ĉe la norda parto de la sudokcidenta altebenaĵo de Ĉinio, la krutaj montpintoj estas ĉiam kovritaj de neĝo kaj vualitaj de ŝvebantaj nuboj kaj nebulo. Apenaŭ videblas homoj. Estas facile imageble, kiel antikvaj vojaĝantoj baraktadis sur tiu vojo.

La loko, kie en la antikveco tro-

viĝis Qingyi-regno kaj Maoniuregno, nun apartenas al Ya'an-subprovinco de Sichuan.

STRIO DA ĈIELO


Trapasinte la monton Zhenxi (Ĝenŝji) de la Qionglai(Ĉjonglaj)-montaro, la vojo frontas al Jinji(Ĝingĵi)-gorĝo. En la 10-kilometra gorĝo malvarmega kaj malsekega

la vojo estas mallarĝa, la ĉielo preskaŭ nevidebla. Pli antaŭe staras Lingjiu(Lingĝiŭ)-monto, kiu nomiĝis Lingshan-monto en la historio. Okcidente de ĝi troviĝas Lingshan-gorĝo, ĉe kies enirejo kuŝas ruinoj de urbo konstruigita de la regnestro Kaiming, suvereno de Shu en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.)

Post tiuj du gorĝoj la antikva

Ya'an





toj de la sudokcidentaj etnoj.

Sude je 8 kilometroj for de la fino de Lingguan-gorĝo situas guberniurbo Lushan, kiu en la antikveco nomiĝis Qingyi (Ĉingji). La urbo ĉe la supra baseno de Qingyi-rivero sidas sur ruinoj de dumiljara antikva urbo, ĉe ĝia suda strato restas mur-fragmentoj de garnizonejo de la periodo de Tri Regno (220-280), kaj Jiangqing-(Ĝjangĉing)-turo en la urbo estas konstruita en la Norda Song-dinastio (960-1127). Lushan estis grava punkto sur la antikva Silka Vojo, kaj tion pruvis multaj historiaj objektoj elterigitaj en tiu loko. 3 kilometrojn sude de la urbo iam estis steleo de Fan Min, kiu nun fariĝis ŝtongravuraĵa muzeo. La steleo de Fan Min kiel unu el la perfekte konservataj steleoj de la Orienta Han-dinastio (25-220) estas ĉiam alte taksata de la fakuloj. Laŭ la stelea surskribo Fan Min vivis en Qingyi en la Orienta Han-dinastio. Liaj prapatroj estis nobeloj en la landinterno de Ĉinio. En 149 Qingyi-regno per donaco engaĝis lin kiel sian ĉefministron por dek jaroj. En 160 li oficistiĝis en Yongchang (la nuna Baoshan, Yunnan-provinco), tiama riĉa

vojo direktiĝas en la 4-kilometran gorĝon Lingguan. Antikvuloj diris, ke tie "videblas nur strio da ĉielo".

Arboj, arbedoj kaj herboj pendas de sur altaj krutaĵoj ambaŭflanke de la valo. Tra la gorĝo de tempo al tempo blovas vento; rojoj kuras rapide. Kornica vojo iras tute apude de la abismo nubokovrita. En la reĝperiodo de la imperiestro Wudi (140-88 a.K. sur trono) de Han-dinastio, kiel imperiestra sendito Sima Xiangru (Sima Ŝjangĵu) venis al la sudokcidenta regiono de Ĉinio kaj notis sian viziton per epitafo. De tiam Lingguan disfamiĝis. Oni eknomis tiun vojon "Lingguan-vojo". Iam inter 58 kaj 75 en la Orienta Han-dinastio Tang Zou, la reĝo de Bailan-regno ĉe la vojo, tributis al Han-kortego en Luoyang (Lŭojang), la ĉefurbo de Han-imperio. Li kun membroj de sia reĝfamilio pasis tra Lingguan-gorĝo. Ili kantante iris al la ĉefurbo:

*Sur lok' sunsubira, kuras amaso
besta,
flugas birdoj en plantar' unik-
specia.
Jen Bailan-regno, hejmo nia.*

Pintoj apikaj, riveroj impetaj

*akompanas nin en vojo de pilgrimo
al Han-imperio en malproksimo.*

La kanto estis registrita de kortega oficisto kaj estis titolita kiel la "kanto de Bailan". Ĝi estas la plej frua el la hodiaŭ konservataj kan-

Ŝtonaj bestoj en la ŝtongravuraĵa muzeo



urbo ĉe la suda fino de la Silka Vojo. Li multe kontribuis al disvastigo de diversetnaj kulturoj kaj al intimigo de la inter-etnaj rilatoj. La reliefoj sur la kornico de la ŝtona arkado ekster la riparita muzeo ja bildigas folklorojn de la tieaj etnoj. 8 versimilaj diversformaj kaj diverspozaj du-metraĵ ŝtonaj bestoj en la muzeo, estas valoraĵoj de ĉina skulptarto.

TEO DE MENGSHAN-MONTO, IAMA TRIBUTO

18 kilometrojn sude de Lushan laŭ Qingyi-rivero estas Feixian-(Fejŝjan)-pasejo (Pasejo Fluganta Feo), kiu de antikveco estas grava trafika punkto de Sichuan al Yunnan kaj Tibeto. Tie nun trapasas aŭtovojoj. Sudoriente de la pasejo kuŝas Mengshan-monto.

La monto sin trovas inter Sichuan-baseno kaj Qinghai-Tibeta Altebenaĵo. Ĝiaj kvin pintoj, el kiuj la plej alta estas 1440 m. super la marnivelo, verdas kun densa plantaro. La tero sur la monto, riĉa je acidaĵoj kaj alkalaĵoj, tre taŭgas por tearboj. Legendo diras, ke en pratempo Yu, tribestro, kiu subigis akvegion, solenis sian sukceson per ĉiel-kulto sur la pinto, kio donis misterajn kolorojn al la loko. Laŭdire, la unua teo-kultivinto sur la monto estis Wu Lizhen (U Liĝen). Antaŭ du mil jaroj epidemio furiozis en Ya'an. Wu Lizhen plukis sovaĝajn te-foliojn de sur la montpinto kaj per ĝia infuzaĵo kuracis multajn malsanulojn. Poste Wu Lizhen transloĝigis sian hejmon al la monto kaj sin vivtenis tie per teo-kultivo. De tiam la "fea teo" el Mengshan-monto ĝuis reputacion tra la tuta lando.

En Tang-dinastio (618-907) imperiestro destinis la teon el Mengshan por tributo. Ĝi servis ne kiel trinkaĵo por la imperiestroj, sed kiel oferaĵo en kultoj al la ĉielo, dioj kaj prapatroj. Eĉ hodiaŭ sur montpinto videblas la imperiestra te-ĝardeno, kie oni speciale kultivis

"tributan teon". En la ĝardeno estas 9 maljunaj te-arboj. De Tang-dinastio ĝis 1911, en ĉiu rikolta tempo de teo la lokaj guberniestroj persone venis al la monto, incensis kaj surgenue riverencis al dio. Sub lia kontrolo oni plukis 365 te-foliojn laŭ la tagnombro en jaro, metis ilin en du arĝentajn vazojn kaj sendis ilin al la ĉefurbo.

En la 50-aj jaroj de la 20-a jarcento la teo de Mengshan-monto estis aljuĝita kiel unu el la dek famaj ĉinaj teo-specioj pro siaj bela formo, smeralda koloro kaj agrabla aromo. En prilaboro oni aparte atentis la kaldronan varmon; neniu folio devas esti brune bakita; ĉiu folio devas esti meze iom kavita kun ĉiuj haroj nekaŝitaj. Laŭ analizo la teo entenas riĉajn fenolon kaj aminan acidon; duono de la substancoj utilaj por la homa korpo estas eltirebla dum ĝia infuzo. Nun sur Mengshan-monto la teo-kultivejo kovras 133 hektarojn. La teo ne plu estas kulta oferaĵo, sed fariĝis ĉiutaga vivbezonaĵo de ordinaraj familioj.

Ĉinio estas la lando plej frua en kultivado, prilaboro kaj trinko de teo. Komence oni ne prenis teon kiel trinkaĵon, sed kiel kuracilon. Kultivo kaj trinko de teo estas iniciativo de la etnoj en sudokcidenta Ĉinio. Eĉ nun la manieca ŝato de teo de la tieaj etnoj estas apenaŭ trovebla aliloke. Estas multaj manieroj por preni teon. Ie oni prenas teon tiamaniere, dum aliloke alimaniere. En inter-etna kaj internacia komerco sur la sudokcidenta Silka Vojo, teo rolas kiel grava varo en var-interŝanĝo. Ĝi iam ludis gravan rolon en prosperigo kaj faciligo de la komerco sur la antikva vojo, kaj la komerco siaflanke akcelis la produkton de teo kaj la disvastigon de teo-kultivo eks-terlande.

"ĈIELO LIKAS" EN YA'AN

Ya'an, grava urbo en la sudokcidenta Sichuan-provinco, situas ĉe Qingyi-rivero. La rivero fluas tra la urbo; pontoj estas super la riv-



Muntejo de leĝeraj aŭtoj en Ya'an

ero, kvazaŭ la urbo flosus sur akvo. Dank' al influo de pacifika subtropika klimato la loko estas malseka kun pli ol 200 pluv-tagoj ĉiujare. Ĝi estas centro de la pluv-riĉaj lokoj en la provinco. Antaŭuloj diris, ke tie la "ĉielo likas"; nun oni diras, ke tie "ne daŭras tritaga sereno".

Pro la senĉesa pluvo oni aspiras al serena tago. Laŭdire stalagmito iam staris sur Zhougong-monto sude de la urbo, kaj oni aŭguris pri la vetero en la pasinteco per ĝia moviĝo aŭ senmoviĝo. Eĉ hodiaŭ oni starigis en la urbo grandan granitan skulptaĵon "Nüwa flikas la ĉielon" el ĉina mito. Ĝi iel trankviligas homojn.

Ya'an sin trovas en aparta geografia medio. Ĝi funkciis kiel transporta loko de oro de sudokcidento al la centra regiono de Ĉinio en la antikveco, kaj nun la regiono fariĝis bazo de ekspluato kaj prilaboro de granitaj kaj marmoraj platoj.




Lingguan-gorĝo, ĉe kiu etendiĝas antikva kornica vojo

La ŝtonplatoj produktitaj tie estas laŭdataj de la ĉinaj kaj alilandaj komercistoj pro la glateco kaj la poluriteco; kaj la livero ne povas kontentigi la mendon. La granito "ĉina ruĝo" estas produktaĵo propra al Ya'an. Ĝi povas rivali kun la mondfama granito "hinda ruĝo". Lastatempe la tieaj fabrikoj enkondukis el Italio kaj Japanio ĉenlaborilarojn de granito, pro kio la produktado iras en granda skalo. Nun ilia jara produktokvanto atingas 50 000 kvadratajn metrojn.

En la loko, kiun frekventis karavanoj en antikveco, nun funkcias

fabriko de leĝeraj aŭtoj por specialaj uzoj. La aŭto kun marko "Tonggong" produktita tie en la lastaj jaroj estis sinsekve permesita de la ŝtato. En la unua 10 000-kilometra konkurso "Beiqi-pokalo" ĝia poentaro viciĝis inter la unuaj. La modernaj aŭtoj rejunigas la antikvan vojon.

En Ja'an vojrompiĝo ofte okazas pro grundo-enfalo kaŭzita de kontinua pluvo. Multaj lokoj estas malfacile pasigeblaj. Niaj prapatroj tamen, defie al la naturaj obstakloj, elektis ĝin kiel stacion sur tiu Silka Vojo. ■



Qingyi-rivero





Te-gardeno sur Mengshan-monto



Sur strato de Ya'an



Pri “Tibeto sur la Monda Tegmento”

de ROBERT C. FRIEND (Usono)

TIBETO SUR LA MONDA TEGMENTO (en Esperanto), 187x260 mm., estas kompilita de la Redakcio de EPC, eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo en 1987 kaj distribuata de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

En la pasinta jaro mi ricevis 6 librojn pri Tibeto. En Usono libroj pri la sama temo aperas unu post alia, ĉar la leganta publiko postulas ilin. Ĉi tie, mi suspektas, ke ili estas eldonitaj por diri la veron pri Tibeto kaj tiel hontigi la Dalai-lamaon, ke li bone konduku kaj ne plu faru sensencajn bruojn pri sendependeco.

Tamen, “Tibeto sur la Monda Tegmento” povas esti konsiderata kiel unu el la plej bonaj el ili. Unuflanke, plejmulto de ĝiaj bonegaj koloraj fotoj ne estas simple prenitaj el malnovaj dosieroj, sed estas novaj kaj veraj kaptajoj pri ĉiutaga vivo en Tibeto. Aliflanke, ĝiaj ĉapitroj estas mallongaj kaj temas pri preskaŭ ĉio, de la tempo de la eonoj, kiam Tibeto estis la fundo de maro, ĝis hodiaŭ kiam aŭtoj konkuras kun poefagoj.

Ĝi ne estas libro referenca. Ekz. ĝi ne mencias, ke en 1951 kun la Centra Popola Registaro Dalai-lamao kaj Banĉen-lamao subskribis la “Interkonsenton pri Paca Liberigo de Tibeto”. Ĝi preteratentas la ribelon de servutulo-posedantoj en 1959 kaj malmulte tuŝas la demokratian reformadon komencitan tiujare, kiu finis la plej malbonan servutan sistemon de la mondo kaj liberigis Tibeton, kaj tiel ĝi fariĝis egala membro de la ĉina familio de naciecoj.



Ĝi estas bona libro por foliumantoj. Sen ekscesaj adjektivoj kaj superlativoj, eĉ la ĉapitrotitoloj estas interesaj: “Sur la Tero de la Antikva Guge-regno” (en la komenco de la 9-a jc. ĝis la mezo de la 13-a jc.), “Trafiko sur la Altebenaĵo”, “Eksaristokratoj de Tibeto”, “Nacimalplimulto en Tibeto”, “La Religia Kredo de Tibetanoj”, “Pri Moroj en Tibeto”.

La plej elstara trajto de la libro, mi pensas, estas, ke ĝi malkaŝis Tibeton, ne per la malnovaj stereotipaj frazoj sed per eniro en la ĉiutagan vivon de ĝiaj popoloj, precipe de ĝiaj nacimalplimulto. La lastaj ses ĉapitroj bone priskribas la ĉiutagan vivon de diversnaciecaj popoloj en Tibeto. La ĉapitro pri aliaj nacimalplimulto en Tibeto estas aparte viveca kaj malkaŝis kiel politiko pri nacimalplimulto de Ĉinio efektiviĝis, eĉ en foraj kaj postĝintaj partoj de Tibeto.

Mi havas opinion pri recenzistoj, kiuj ne kritikis sed nur laŭdas.

Libro-recenzo devas juste reflekti opiniojn de la recenzisto. Tial mi aldonos kelkajn punktojn, malpli gravajn sed eble okulfrapajn.

Estas tre malmultaj alilandaj legantoj, kiuj scias la “Monton Ĉomolangma”. Ĉu la redaktoro povus enmeti “Monton Everesto” en parentezojn por helpi ilin en la legado? (Same por “La Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco”. Kio tio estas?) Rilate notojn pri statistikoj, iuj, kompreneble, estas necesaj, sed troigo tendas legantojn: Ĉapitro I havas 6 ciferojn en unu paĝo, ĉapitro IX 16 en unu paĝo, kaj ĉapitro X 27 en unu paĝo.

Rekomendante la libron, mi faru lastan komenton: Kiel ĉiu ajn alia parto de Ĉinio, Tibeto havas problemojn en multaj flankoj. Pensplena ĉapitro povus komplete trakti la problemojn. (P.S. Mi estas ĝoja, ke la redaktoroj ne multe tuŝis Dalai-lamaon, ĉar Tibeto estas montego, sed li nur monteto.)

POR KOMENCANTOJ

Du antikvaj fabloj de Ĉinio

Tajloro


TAJLORO estis petita por kudi vestojn. La tajloro pride mandis la veninton pri la karaktero, la aĝo kaj la aspekto de lia mastro kaj ankaŭ pri la dato de ties sukceso en ŝtata ekzameno*, sed tute ne menciis la mezurojn de la vestoj. En miro demandis la



veninto pri la kialo kaj la tajloro klarigis: "Junulo facile fieriĝas pro la sukceso, kaj li iras parade kun elstara brusto. Vesto por tia homo devas havi antaŭan baskon pli longan ol la posta. Dume maljunulo sin tenas sobre kaj iras sin klinante, tial lia vesto devas havi postan baskon pli longan ol la antaŭa. Vesto por dikulo devas esti larĝa ĉe la talio, dum tiu por maldikulo devas esti mallarĝa. Tiu por rapidemulo devas esti mallonga kaj tiu por malrapidemulo devas esti longa. Ĉiu homo havas sian apartan mezuron." Tia tajloro estas konsultinda. Sed nun la tajloroj decidas mezuron laŭ la malnovaj vestoj, prenas reversitan fasonon kiel modan, sen ajna kompreno pri la ĝusta mezurado. Kun ŝtofo en la mano, ili cerbumas unue pri ŝparo de ŝtofo por alproprigi la restan pecon. ■

Spegulo

ESTIS homo, kiu kredis nur siajn okulojn kaj malŝatis spegulon. Li diris: "Spegulo ŝatas



montri mian malbonaĵon. Mi havas okulojn, kaj tute ne bezonas tiun aĵon." Dum longa tempo li ne trovis belulon, kvankam estis multaj beluloj tre famaj. Li ne sciis, ke sur lia vizaĝo estas multaj nigraj makuloj, sed male, li rigardis sin la plej bela. Liaj konatoj ŝtele mokis lin, sed li neniom rimarkis. Vere tragika afero. ■

*Ŝtata ekzameno: Dum longa tempo antaŭ 1911 la registaroj en la feŭdisma Ĉinio praktikis ŝtatan ekzamenon. Sukcesintoj de la ekzamenoj ricevis kvalifikitecon por esti ŝtatoficiistoj.

KORESPONDI DEZIRAS

* 29-j. instruisto dez. kor. tm. pri ĉt. kaj interŝ. pm. kaj E-gazetojn. Adr.: Liu Gang, Daye Youse Jinshu Gongsu Jixiao, Huangshi, Hubei, Ĉinio.

* Fraŭlo Ali Reza Borzui, 20-j. studento, dez. kor. kun geesp-istoj tm. pri Esperanto, pentraĵo, vivo kaj interŝ. belajn pm. kaj pk. Adr.: 569 Mohammadi Street, Zandi Laine, Codpost 18637, Tehran, Iran.

* 39-j. inĝeniero proponas amikecan korespondon kaj interŝ. pm. Aleksandro Batarŝin, K. Marks 74 kv 24, 685030 Magadano, USSR.

* 26-j. impostisto dez. kor. kun filatelistoj por kolekti kaj interŝ. nes-tampitajn pm. kaj Esp. poŝtaĵojn

pri internacia jaro, monda festo, hundoj ktp. Adr.: Shan Xianhuai, 130300 Dehui Xianwei Dangxiao, Jilin, Ĉinio.

* Xue Jun, 22-j. instruisto, dez. kor. kun esp-istoj de Nederlando, USSR, Japanio, Svedio, Ĉeĥoslovakio, interesiĝas pri literaturaĵoj, poezio kaj filatelo. Adr.: 107-13, Jingshan Lou Tanjia Zhuang, Dong Kuang Qu, Tangshan, Hebei, Ĉinio.

* 58-j. komencanto dez. kor. tm. pri literaturo, fotografio kaj aliaj temoj. Adr.: Rudolf Gruber, Bachpromenade 39, A-2020 Hollabrunn, Aŭstrio.

* Freŝfondita Esperanto-rondeto (13 knabinoj 11-14j.) dez. kor. tm. pri ĉt. kun samaĝuloj. Ni petas

geesp-istojn helpi al ni organizi Esperanto-bibliotekon. Skribu al: P.K. 2040. Barnaulo-64, 656064 USSR.

* Bonvolu sendi bk. salutleterojn aŭ E-aĵojn al E-Klubo. Ni garantias resp. al ĉiuj. Pawel Nowak, P.O. Kesto 30, PL 34-120 Andrychow, Pollando.

* Dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Ahmad Ebrahimi, No: 34, Alley No 20 of villa Kashany, St., Zip code 89167 Yazd, Iran.

* Korespondemuloj sendu vian anonceton por senpaga enpresigo en "KORESPONDI". Por ricevi specimenon aŭ provekzempleron sendu 3 irk. aŭ dek fr. frankojn aŭ du usonajn dolarojn al Bellerive s/Allier. Francio.

ĈINAJ ROBOTOJ



Roboto en arka veldo

EN la salono de elektronikaj aparatoj de la Kanta Foiro de Ĉinaj Eksportaĵoj aperis “fraŭlino” en veluraj vestoj, kun perla koliero ĉirkaŭ la kolo kaj bela hararo karesanta la ŝultrojn. Oni nomis ŝin “Fraŭlino Chengrong”. Ŝi ĝentile ridetis al la vizitantoj, pacience konigis la eksponaĵojn al ili kaj respondis iliajn demandojn en la ĉina kaj angla lingvoj.

Ŝi estis homfigura intelekta roboto regata per voĉoj, farita de la Chengdu-a Telekomunik-inĝeniera Instituto de Sichuan-provinco.

Roboto aperis en Usono komence de la 60-aj jaroj. Ĝi vekis altan takson de diversaj landoj per pluraj funkcioj, alta precizeco kaj superhoma kapablo.

En la 70-aj jaroj Ĉinio komencis esplori roboton. En 1985 la ĉina registaro prenis provfaradon de roboto kiel ĉefan taskon de scienco kaj tekniko. La Ĉina Akademio de Sciencoj, altlernejoj, esploraj institucioj kaj industriaj departementoj elfaris pli ol 100 industriajn robotojn. Kaj en la lastaj jaroj oni elfaris dekelkajn altgradajn intelektajn robotojn.


En la robota instituto sub la Harbin-a Politekniko pli ol 40 scienc-esploristoj laboras super roboto. Iliaj robotoj por arka veldo, punkta veldo, lakŝprucado kaj universala uzo estas unuageneraciaj instruaj kaj demonstraj robotoj kaj jam ludas sian rolon en produktado. La robotoj por arka kaj punkta veldo instaligis sur aŭto-produkta linio de fabriko. Ili povas senerare celi veldopunkton per veldilo, rapide kaj bone plenumi la laboron.

En la industria produktado lakŝprucistoj laboras en tre malfavora labormedio. Por plibonigi la labor-kondiĉojn, plialtigi la kvanton kaj kvaliton de produktoj, tri entreprenoj de Nankino elfaris la unuan lakŝprucan roboton de Ĉinio en 1987. Ĝi havas kvin liberecojn de moviĝo. La manipuliloj povas moviĝi supren, malsupren, dekstren kaj maldekstren. La kosto de la roboto estis multe malpli alta ol tiu de importita.

La Shenyang-a Aŭtomatesplora Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj estas la unua bazo de Ĉinio por disvolvi la teknikon de roboto. Nun ĝi okupiĝas ĉefe pri la laboro super intelekta, specifa



Fraŭlino Chengrong



Roboto ludas elektronikan orgenon.

kaj subakva robotoj.

Ĝia roboto Pioniro 1 estas movebla specifa roboto kun plurspecaj sensoratoroj. La roboto konsistas el raŭptraktoro, plurartika manipulilo, kamerao, supersona telemetro, infraruĝa alira sensoratoro, odometro, instalaĵoj de televid-elsendo kaj komunikado kaj havas la kapablon iri surkampe, ascendi kaj descendi ŝtuparon. Telegvidate, ĝi povas fari mezuradojn, danĝer-forigojn, muntadon kaj malmuntadon en danĝera kaj venena loko.

La instituto produktas ankaŭ plurspecajn marajn robotojn. La mara roboto Orfiŝo povas fari subakvajn observojn, fotadon, hidrologian esploron, esploron pri vivaĵoj kaj kontrolon de konstruaĵoj en apudkontinenta maro, lago kaj akvorezervejo. Krome, ĝi povas ankaŭ helpi subakvistojn en elakvigo kaj bredadon de akvoproduktaĵoj. La roboto Orfiŝo 2 sukcese plenumis la taskon de subakva observo ĉe Fengman-hidroelektrajo de nordorienta Ĉinio. Pli grandigi la kapaciton de la elektrajo estas grava konstruo de Ĉinio. Por fari tion necesas granda kvanto da materialoj por subakva observo. La subakva observo de la roboto montris, ke la subakva malpuraj-barilo ne difektiĝis, la gvidaj reloj de la kluzpordoj povas esti uzataj plu kaj la subakva betona surfaco en la supra baseno de la elektrajo devas esti firmigita. La akiritaj donitaĵoj kaj fotoj prezentis sciencajn bazon al la projekto pri la pli grandigo. Tia roboto kreis bonajn kondiĉojn por

kontroli kaj ripari grandajn kaj mezgrandajn akvorezervejojn. Kunlabore kun koncerna usona fako, la Shenyang-a Aŭtomatesplora Instituto projektis kaj elfaris mezgrandan telegvidan subakvatoron, kiu atingis la internacian nivelon de samklasaj produktoj en la meza periodo de la 80-aj jaroj. Tia roboto povas subakviĝi 300 metrojn kaj uziĝi por ekspluati maran petrolon kaj elakvigi dronintan ŝipon ktp.

Samtempe kun tio, Ĉinio donas grandan atenton al esploro pri intelekta roboto kun plurspecaj sensoratoroj, kiu apartenas al la triageraciaj robotoj. Ricevinte instrukcion, ĝi povas mem ellabori programojn laŭ objektivaj kondiĉoj. La "Fraŭlino Chengrong" menciita en la komenco de tiu ĉi artikolo estas nova produktaĵo tiurilate.

Ankaŭ la Xibei-a Telekomunik-ingeniera Instituto de Xi'an, Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco, elfaris roboton altan 1.6 m kaj pezan 45 kg, kiu aspektas kiel antikva ĉina belulino. Ĝi povas diri 100 frazojn en la ĉina lingvo, libere movi siajn kapon, brakojn, kubutojn, manojn kaj eĉ fingrojn, iri antaŭen kaj malantaŭen, turni sin kaj danci en akompano de muziko. La roboto farita de Qinghua(Ĉinghŭa)-universitato havas rapidan praktikan vidon. Ĝi povas ne nur plenumi la taskon mezuri kaj munti, sed ankaŭ ludi ŝakon kun homo. Ĉiuj ĉi robotoj rekomencas multjarajn penadojn de ĉinaj altteknikaj fakuloj kaj, sendube, estos antaŭirantoj de plenaŭtomataj intelektaj robotoj de Ĉinio. ■

● Je la 21-a de aprilo ĉi-jare, la Esploro de Nuklea Fiziko kaj Kemio sub la Ĉina Instituto de Inĝenieria Fiziko sukcese reapertigis fuzion en normala temperaturo.

Esploristoj trovis altenergiajn neŭtronojn per du metodoj. Unu sciencesplora grupo enigis du elektrodojn platenan kaj paladian en pezan akvon, post konektado de 120 horoj oni trovis pli ol cent neŭtronojn en ĉiu sekundo. Fakuloj ekspertizis, ke la neŭtronoj aperintaj en la eksperimento vere estas produktaĵoj de fuzia reakcio. Alia grupo uzis deŭterion (izotopo de hidrogeno, grandkvante ekzistanta en marakvo) kaj paladion kiel elektrodojn kaj aplikis malsaman mezuran rimedon, kaj en la sama tago ili trovis ankaŭ fuziajn neŭtronojn de relative alta produkta kvanto.

● La 6-an de majo fermiĝis en Pekino la 22-a jarkunveno de la konsilio de la Azia Disvolva Banko daŭrinta tri tagojn. La prezidanto de la jarkunveno estis Li Guixian, bankestro de la Ĉina Popola Banko. Li diris, ke dum la jarkunveno oni faris fruktodonan diskuton pri serio da demandoj rilataj al vasta sfero, kaj tio helpas la konsilianojn de la banko en ellaboro de pli pru-

denca kaj pozitiva politiko kaj ebligas al la banko fari pli pozitivan kontribuon al la ekonomia kunlaboro de la azia kaj pacifika regiono.

● Antaŭ nelonge estis subskribita en Limao de la Suda Ameriko unua kontrakto pri grandkvanta eksportado de ĉinaj aŭtobusoj. Laŭ la kontrakto Peruo pagos en formo de kompensa komerco por tiuj ĉinaj aŭtobusoj.

● La 6-an de majo malfermiĝis la aerlinio Pekino — Xiamen — Singapuro. Ĝi longas pli ol 5000 km. kaj bezonas flugon de ĉ. 6 horoj.

La 2-an de majo oni malfermis la aerlinion de Pekino rekte al Frankfurto de FR Germanio.

● En 1988 Ĉinio veturigis 400 internaciajn pasaĝerajn trajnojn, kiuj transportis 65000 pasaĝerojn.

● La 29-an de aprilo malfermiĝis la 65-a Kantona Foiro de Ĉinaj Eksportaĵoj de Ĉinio. Ĝin vizitis proksimume 40000 komercistoj el pli ol 100 landoj kaj regionoj kaj la valoro de eksportaĵoj atingis 5.3 miliardojn da usonaj dolaroj.

● La 6-an de aprilo, 9 novaj


inventajoj inkluzive de “seriaj harpanaceoj 101” inventita de Zhao Zhangguang de Ĉinio gajnis oran medalon kaj prezidantan premion de la Franca Respubliko en la 80-a Pariza Internacia Ekspozicio de Inventajoj.

● Nun la mondo produktis ĉiujare 12 miliardojn da kraĵoj, kiuj bezonas 600000 kubmetrojn da ligno. Yong Chaozhu, vicesploristo de la Guizhou-provinca Arbarkultura Esplora Instituto de Ĉinio, lastatempe inventis paperan kraĵonon. Unu kvaronfolia ĵurnalo povas anstataŭi lignon por 6 kraĵoj. Ekspertizo kaj prova uzo de lernantoj montris, ke ĝi estas konforma al la internaciaj normoj.

● La 7-an de majo ĉinaj plonĝistoj Xiong Ni kaj Gao Min gajnis ĉampionecon de vira 10-metra turplonĝo kaj virina 3-metra trampolina plonĝo en la 6-a Mondpokala Plonĝa Konkurso okazinta en Indianapolis de Usono. La ĉina teamo gajnis entute 7 orajn medalojn en la kvintaga konkurso.

● Venontjare espereble finkonstruiĝos Eŭrop-Azia Fervojo oriente de Lianyungang-haveno de Ĉinio ĉe la Flava Maro okcidente ĝis Roterdamo de Nederlando.

Fakuloj de la Pekina Instruista Universitato analizas neŭtronaĵon spektrojn.



La 22-a jarkunveno de la konsilio de la Azia Disvolva Banko





Ujguroj en stacio de Bejiang-fervojo, parto de la Eŭrop-Azia Fervojo



Supre: Xiong Ni en konkurso

Malsupre: Xiong Ni (meze) premiita

La fervojo kunligos Eŭropon kaj Azion, Pacifikon kaj Atlantikon, pli ol 30 landojn kaj regionojn kaj formas ekonomian koridoron longan je 10000 km.

● Neprofita lingva lernejo funkciigata de la Franca Kultura Asocio unuafoje aperos en Kantono de suda Ĉinio. Ĝi dungos spertajn lingvajn instruistojn el Francio kaj aplikos avangardajn metodojn por

instrui al ĉinoj la francan lingvon.

● Antaŭ nelonge Ĉinio elterigis fosilian dinosaŭron en Guangchang-gubernio de Jiangxi-provinco. Ĝi longas 6 metrojn, larĝas 1.7 metrojn kaj altas 1.6 metrojn. Ĝia korpo estas plata kaj malalta, la kvar membroj estas mallongaj kaj dikaj, la antaŭaj malpli longaj ol la postaj, ĝi portas skvamojn kaj ostopikilojn. Ĝi estis

herbovora vivinta antaŭ 70 000 000-100 000 000 jaroj. Ĝi estas la plej kompleta dinosaŭra fosilio trovita en Ĉinio kaj servas kiel nova materialo por esplori la historion de ĉinaj antikvaj vertebruloj.

● Ĉinaj geologoj lastatempe trovis en la orienta parto de Shandong-provinco grandan orminon kun areo de ĉ. du kvadrataj km. kaj rezervokvanto super 50 tunoj.

Konkurso de scioj pri la nova Ĉinio okaze de ĝia 40-a datreveno

Celebre al la 40-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, Radio Pekino okazigas Konkurson de Scioj pri la Nova Ĉinio. Estas sume 10 demandoj. Ili estas:

1. Kiu en kiu jaro, kiu monato, kioma tago kaj kie oficiale proklamis la fondiĝon de la Ĉina Popola Respubliko? Kiu estas ĝia nuna ŝtata prezidanto? Kiu estas ĝia nuna ĉefministro?

2. Kiom da areo la ĉina teritorio havas? Kiom da administraj regionoj ĉe provinca nivelo estas difinitaj en Ĉinio? Kiu estas la nove fondita provinco?

3. Kiom da loĝantoj Ĉinio havas (ĝis la 14-a de aprilo, 1989)? Kiom da naciecoj estas en Ĉinio? Kiuj estas la kvin naciecaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio?

4. Kun kiom da landoj Ĉinio jam starigis diplomatajn rilatojn? Kiam kaj kie okazis la pinta intervidiĝo inter Ĉinio kaj Sovetunio?

5. En kiu jaro Ĉinio komencis praktiki la politikojn de reformado kaj malfermo?

6. Kio estas la kvar grandaj inventoj de Ĉinio en la antikveco? Kie troviĝas la satelita lanĉobazloko de Ĉinio?

7. Kio estas la ĉina tradicia korposaniga sporto?

Kiun grandan internacian sportkunvenon Ĉinio entreprenos en 1990?

8. Kiam fondiĝis Radio Pekino? En kiom da lingvoj ĝi disaŭdigas siajn programojn?

9. Kiam komenciĝis la Esperanto-programo de Radio Pekino? En kiu jaro ĝi fariĝis ĉiutaga? Al kiuj regionoj nun ĝi ĉiutage direktiĝas?

10. Kiuj regulaj programoj nun estas en la Esperanto-elsendo de Radio Pekino? Pri kiuj temoj vi deziras aŭskulti?

Por la konkurso ni establis unuaklasajn kaj duaklasajn premiojn. Ĉiuj sukcesintoj ricevos belajn premiojn. Ĉiuj partoprenantoj de la konkurso ricevos belan memorkarton.

Por helpi interesatojn ĝuste respondi al la supre menciitaj 10 demandoj, en la 5-a de junio ni komencis elsendi en nia Leterkesto kernajn artikolojn kaj ilin realsendos en septembro.

Limdato por respondoj estos la 31-a de oktobro, post ĝi neniuj respondoj validos. Ni varme bonvenigas vin partopreni en tiu ĉi konkurso kaj deziras al vi brilan sukceson.

**Esperanto-sekcio
de Radio Pekino**

ĈINIO ELIRAS EL SEKSAJ TABUOJ

ANTAŭ unu jaro altranga oficisto de la Monda Higiena Organizo, kiu venis al Ĉinio por fari esploron, kun bedaŭro diris: "En la medio de la ĉina kulturo estas malfacile publike preparoli seksologion."

Efektive, la seksaj problemoj en Ĉinio ĉiam estas misteraj kaj sentivaj. Post fondiĝo de la nova Ĉinio, mankis seksologio en la lecionoj kaj studobjektoj de ĉinaj medicinaj institutoj aŭ lernejoj, kaj la hospitaloj ne akceptis pacientojn de seksa misfunkcio, por ne paroli pri la publika kaj scienca priseksa eduko. Tio estigis inter la popolojn sencion pri sekso, mornecon kaj anormalan psikon kaj kaŭzis iujn sociajn problemojn. Koncernaj statistikoj montras, ke en 1987 35% de la ĉinaj gejunuloj havis seksan

Instruado de seksaj scioj al mezlernejanoj



konduton antaŭ sia edz(in)iĝo. Pli ol duono de la junaj gekrimuloj krimis de seksaj problemoj. Statistiko de obstetrikaj hospitaloj de iu suda urbeĝo montras, ke gravediĝo de 60% de la abortintoj okazis ekster geedzeco. Kvarono de la nunaj eksedziĝaj procesoj en la grandaj urboj de Ĉinio estis kaŭzita de malakordo en la seksa vivo.

En 1979 Ĉinio paŝis en la reforman kaj pordomalferman periodon, tio pretigis kompare tolereman socian medion por la ĝeneraligo de priseksa eduko kaj la florado de seksologio. Post 1980 la diversaj socirondoj de Ĉinio alvokis, ke oni publike faru ĝeneralan edukon pri seksaj scioj, por ke oni liberigu sin de la seksaj mistero kaj sencio.

Statistiko montras, ke nun 57.93% de la 13-jaraj mezlernejanoj ekhavis menstruan kaj 59.34% de la 14-jaraj mezlernejanoj jam spertis spermo-elĵeton. Multaj erudiciuloj rigardas la mezlernejajn jarojn kiel ŝtorman periodon. Antaŭ la ŝtormo neniu preventa rimedo efikas.

En 1982 15-jara knabino de Hongxing-mezlernejo, Ŝanhajo subite fariĝis fraŭlino-patrino, pri tio aperis diversaj opinioj en la socio. Por depreni la misteran vualon de la seksaj problemoj, vicestrino de la mezlernejo mem kompilis instruajn materialojn, kombinante seksajn fiziologion, psikologion kaj moralon, kaj faris la unuan provan instruadon pri puberaj lecionoj al la duaklasanoj kaj sesaklasanoj. Ŝi pendigis bildojn de homa anatomio sur la nigran tabulon kaj prelegis pri menarko kaj sekundaraj seksaj trajtoj. Tio rikoltis bonan rezulton. En 1984 tiu vicestrino estis transpostenigita al la Instituto pri Adolekantoj sub la Ŝanhaja Akademio de Sociaj Sciencoj kaj okupiĝis pri pubera eduko. En 1985 la instituto kaj la Ŝanhaja Eduka Buroo kune faris provan puberan edukon en 100 mezlernejoj kaj poste en 250 mezlernejoj. Nun kvarono de la ŝanhajaj mezlernejanoj estas edukata tiufланke.

Enketo de 30 000 mezlernejanoj el 11 distriktoj de Ŝanhajo montras, ke dank' al la pubera eduko 99% de la lernantoj akiris seksajn sciojn kaj malaperis ĉe ili la seksaj mistero, scivolemo kaj timemo. La nombro de tro fruaj enamiĝint(in)oj reduktiĝis de 3.7%



Mezlernejaj libroj por adoleskanteca instruado



Studo de adoleskanteca higieno

al 1.26% de la enketitoj, la krimintaj lernant(in)oj nun konsistigas nur 0.03% de la lernantoj, kiuj antaŭe konsistigis 2.8% de ili, dume la meznombra poentaro de la lernant(in)oj leviĝis de 70.7 al 78.5.

Pluraj mezlernejoj de Kantono, Tianjin kaj aliaj lokoj donas lecionojn de fiziologia higieno al la lernantoj kaj lernantinoj aparte. La lecionoj kun malsamaj enhavoj de seksaj scioj estas donataj al la malsamaĝaj lernantoj. Krome, oni donas ankaŭ apartan helpon por ke la lernantoj konu la fiziologiajn kaj psikologiajn karakterojn de adoleskanteo kaj dece konduitu laŭ moralo.

En la lastaj jaroj grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio faris moderan edukon pri seksaj scioj kaj akiris bonan socian efikon. Precipe al novaj geedzoj oni donis tian edukon, donis al ili eŭgenikajn kaj kontraŭkoncipajn sciojn kaj sciojn de la geedza vivo, faris konsultiĝan servon pri preventado kaj kuracado de seksa misfunkcio kaj liveris al ili preventilojn. Oni alte taksis ankaŭ klerigon de la naskipovaj geedzoj pri nasko kaj gravediĝo. Ŝanhajo kaj iuj aliaj grandaj urboj faris lecion-donon, apartan konsultiĝon, ekzamenon kaj kuracadon al sterilaj pacient(in)oj por elimini ilian psikan perturbon en koncipado pro manko de seksaj scioj kaj malakordo en la seksa vivo. En la lastaj jaroj pluraj eldonejoj de Ĉinio eldonis seksologiajn librojn.

En 1988 Pekino, Kantono, la provincoj Sichuan kaj Jiangsu (Ĝjansu) funkciigis kursojn de seksaj scienco kaj medicino. La seksologia kurso funkciigata de la scienc-esplora instituto sub la Ŝtata Komisiono de Naskolimigo kaj la Genetika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj donas fakajn kaj praktikajn sciojn: La evoluo de seksologio kaj ĝiaj ĉefaj sukcesoj, la seksaj fiziologio, psikologio kaj reakcio de viro kaj virino, seksa misfunkcio de viro kaj virino kaj la kuracado, priseksa eduko al adoleskuloj, psikaj problemoj en amo kaj edziĝo, funkciigo

de seksa konsultiĝa servo, trovo kaj diagnozo de priseksa psika anomalia, preventado kaj kuracado de veneraj malsanoj, psiko de seksa krimo kaj ĝia preventado.

En la pasintaj jaroj tre malmultaj ĉinoj kuraĝis okupiĝi pri kuracado de seksaj misfunkcioj, tial ĝis nun mankas fako de la koncerna kuracado. Psika kuracado estas unu el la plej gravaj terapioj de seksaj misfunkcioj. Sed nur malmultaj ĉinoj sin okupas pri seksa psikoterapio. Pro nesufiĉa propagando multaj pacientoj ne rigardas la psikajn seksajn misfunkciojn kiel malsanon, kaj ne petas helpon de kuracistoj.

La faka ambulatorio por impotenteco, antaŭtempa spermoelĵeto, sterileco kaj aliaj seksaj misfunkcioj estas multe vizitata de pacientoj. Nun tiaj fakaj ambulatorioj estas kaj malgrandaj kaj malmultaj. Ili troviĝas nur en kelkaj urboj. Frekventas fakajn ambulatoriojn multaj pacientoj, inkl. de la alilokaj post kiam la ĵurnalismo publikigis ilian benefikon en la kuracado. La kuraca kaj esplora centro por viraj seksaj misfunkcioj, fondita en Ŝanhajo aprile 1988, per medikamenta, mekanika kaj psikologia terapioj jam kuracis 15000 homojn ĝis nun kaj resanigis pli ol mil suferantojn de impotenteco. Nun funkcias famaj fakaj ambulatorioj tiuflankaj kiuj troviĝas en Hangzhou, Shenzhen, Lanzhou kaj Pekino.

La vira seksa misfunkcio, sterileco, spermobanko kaj artefarita ensemado apartenas al la kategorio de andrologio nove aperinta en la mondo. Kun certa bazo tiuflanka Ĉinio havas sian fakan trupon. De post 1980, ĉinaj medicinaj rondoj faris fakan kunlaboron kaj interŝanĝon pri andrologio kun aliaj landoj, okazigis kvin internaciajn seminariojn en Pekino kaj aliaj lokoj, sendis dekojn da fakuloj al Usono, Britio, Aŭstralio kaj aliaj landoj por studo. Ĉinio jam eldonis tri grandajn fakajn verkojn pri andrologio. ■

KORPOSANIGAJ METODOJ

(VIII)

VEZIKA MALSANO

Laŭeble etendu la brakojn horizontale dekstren aŭ maldekstren kun rektigitaj manoj (Bildo 1), per atento irigu vitalan energion de la kapo al la piedoj. Ripetu tion 21 fojojn. Post tio, turnu vin kaj rigardu antaŭen, skuu 7 fojojn la ŝultrojn kaj brakojn de antaŭe malantaŭen kaj fine turnu la talion 7 fojojn (Bildo 2). Tio povas forigi ventran ŝvelon, malvarmon en la veziko, talio, spino kaj brakoj, palpitation k.a.

HERNIO

1. Staru, fleksu la talion kaj tiru per la manoj la piedfingrojn tiel longe, ĝis vi spiras 5 fojojn. Post

tio, dum elspiro malŝveligu la subventron, laŭeble klinu la kapon kaj supran parton de la korpo kaj dum enspiro laŭeble elstarigu la bruston kaj levu la kapon por glate irigi la vitalan energion en la ventro. Tio utilas por kuraci hernion.

2. Sidu kaj etendu la piedojn. Kaptu la dikajn piedfingrojn per la manoj kaj laŭeble tiru ilin supren (Bildo 3). Levu la piedojn kaj klinu la kapon al ili tiel longe, ĝis vi spiras 5 fojojn. Dum enspiro laŭeble elstarigu la bruston kaj levu la kapon kaj dum elspiro malŝveligu la subventron kaj laŭeble klinu la kapon kaj supran parton de la dorso por irigi per atento la vitalan energion en la ventro al la tuta korpo. Tio vigligas vin kaj utilas por forigi hernion.


3. Kunigu la piedojn kaj per la manoj kaptu la kalkanojn (Bildo 4), tiru ilin supren, klinu la kapon malantaŭen. Tion faru 21 fojojn laŭeble. Post tio, forte etendu la manojn kaj piedojn ambaŭflanken. Tion faru 14 fojojn laŭeble. La ekzercado povas forigi malsanojn en la kavaĵoj kaj malvarmon en la malsupra parto de la korpo.

BLENORAGIO, OFTA URINADO KAJ ENUREZO

1. Kaŭru kun la brakoj super la planko je ĉ. 33 cm. Etendu la manojn de la flankoj laŭ la poplitoj kaj internaj partoj de la kruroj ĝis la instepoj. Per la manoj rapide kaptu kaj forte premu la piedfingrojn (Bildo 5), por ke ili fleksiĝu internen. Tio faciligas la funkcion de la talio kaj iliako kaj kuras blenoragion.

2. Kuŝu surdorse kun la manoj sur la genuoj kaj la kalkanoj tuj sub la koksoj. Enspiro per la buŝo kaj ŝveligu la ventron kiel eble plej forte. Poste, elspiro per la nazo. Tio povas kuraci blenoragion kaj oftan urinadon.

(Daŭrigota)



KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* 46 E-gekursanoj (15-50j.) el diversaj lokoj de Estonio dez. trovi por si leteramikojn el tuta mondo. Skribu al adreso de kursgvidanto: SU-202900, Estonio, Viljandi, p/k 82, Rein Saag.

* 30-j. inĝenierino dez. kor. Esperante aŭ angle kun diverslandaj geamikoj. Skribu al: J Pauliute, LTSR 25-ĉio 96-15, Kaunas 233036, Litovio, Sovetunio.

* Jolanta Otta, 38-j., dez. kor. tm. pri ĉt., interesiĝas pri turismo, pm. kaj bk. Adr.: 83-130 Pelplin, ul Kościuszki 32a/5, Pollando.

* Gong Xuelin, 30-j. esploristo de la angla lingvo, dez. kor. tm. pri literaturo kaj tradukado, interŝ. librojn kaj gazetojn anglajn, Esperantajn kaj ĉinlingvajn, kaj kolektas pm. kaj fotojn. Adr.: Nanzhang Jiaowei, Hubei, Ĉinio.

Turismo en Pekino

LA 24-an de novembro 1987 en la grandioza Pekina Hotelo Chen Xitong (Ĉen Ŝjitong), urbestro de Pekino, donacis, al s-ro Desmoulin, franca emerita teknikisto delikatan metiartaĵon, modelon de antikva konstruaĵo — la Ĉiela Altaro, por gratuli ke li fariĝis la miliona alilanda turisto al Pekino en 1987. Tio estis la unua fojo, ke Pekino akceptis pli ol milionon da eksterlandaj turistoj en unu jaro. En 1988, 1.2 milionoj da eksterlandanoj vizitis Pekinon. Tiujare vojaĝis al Pekino ankaŭ 5.8 milionoj da enlandaj turistoj.

Pekino havas historion de pli ol 3000 jaroj. En la mezo de la 12-a jarcento, Jin-dinastio prenis ĝin kiel sian ĉefurbon, ekde tiam, ĝi fariĝis ĉefurbo de pluraj dinastioj. Dank' al tio, en Pekino estas multaj historiaj objektoj, kiaj la imperiestraj ĝardenoj, palacoj, sennombraj temploj kaj pagodoj. Ĝi estas vera ĉina kultura muzeo kaj fama turisma loko aspirata de la ĉinaj kaj alilandaj turistoj.

La unua surluniginta kosmonaŭto de Usono diris, ke en la spaco, per nudaj okuloj li vidas nur du konstruaĵojn sur la Tero, t.e. la Grandan Digon ĉe la Maro de Nederlando kaj la Grandan Muron de Ĉinio. La Granda Muro, unu el la plej grandiozaj antikvaj konstruaĵoj de Ĉinio, kun totala longeco de 7000 km., komenciĝas de Jiayuguan (Ĝjajuguan) okcidente kaj finiĝas en Shanhaiguan oriente. La Granda Muro en Pekino longas 180 km. En Badaling ĝi estas plej bone konservita kaj nepre vizitinda por ĉiuj turistoj. Ĉinoj ŝatas diri: "Kiu ne atingos la Grandan Muron, ne estos bravulo." Eĉ brita ĉefministro, usona

prezidanto kaj lia edzino, iam grimpis sur ĝin, por esti bravuloj. Laŭ statistiko, ĉiutage pli ol 20000 personoj vizitas la Grandan Muron ĉe Badaling.

La Imperiestra Palaco en Pekino konstruita en 1420 nomiĝas ankaŭ Malpermesita Urbo. Tie regis imperiestroj de Ming- kaj Qing-dinastioj. Tie staras grandioza domaro el 9900 ĉambroj kun gravuritaj traboj kaj pentritaj kolonoj. Ĝi estas la plej granda kaj plej komplete konservita palaca konstruaĵo nun ekzistanta en Ĉinio. La filmo "La Lasta Imperiestro" pri la vivo de Puyi, la lasta imperiestro de Ĉinio, redaktita de fama itala filmo-reĝisoro Bertolucci, kun la Imperiestra Palaco kiel la fono, akiris 8 premiojn en la 60-a Oskarkonkurso. Pro tio, la Imperiestra

Palaco fariĝis pli alloga. Oni forte deziras rigardi la tronon, la liton, sur kiu kuŝis imperiestro kaj liaj edzinoj, la lokon, kie la imperiestra patrino Cixi (Ciŝji) decidis la ŝtatan aferon post kurteno, la palkonon de imperiestro, kaj eĉ lian skatolon de lokusto... Krom la Imperiestra Palaco en Pekino estas ankaŭ majestaj imperiestraj maŭzoleoj, imperiestraj ĝardenoj kun belaj pejzaĝoj kaj la Ĉiela Altaro, kie imperiestro kultis la ĉielon.

La natura pejzaĝo de Pekino estas ĉarma. Printempe kaj somere pompas floroj, prosperas primitivaj arboj. Ĉie estas viveco kaj prospero. En aŭtuno, la plej bela sezono de Pekino, Xiangshan-monto vestiĝas per ruĝaj folioj. En frosta vintro, post neĝego la ĝardenoj en blanka vestaĵo kun ruĝa ornamo ja

Aĉeto de metiartaĵoj

Foto de ZHANG JIANYI







Tian'anmen-placo en nokto
Foto de E YI



Mingyuan-hotelo en antikva
stilo
Foto de E YI



Aiilandaj turistoj en la parko Ĉiela Altaro Foto de ZHANG JINGDE



En Dagan-ĝardeno Foto de WANG WENBO

Ĉinaj kaj aiilandaj gejunuloj Foto de ZHANG JINGDE





En la hejmo de loĝanto

Foto de ZHANG JINGDE

ĉarmas aparte superbe.

Kiel turisma urbo, Pekino estas ankoraŭ juna. En 1978 iu turisma grupo el pli ol 20 personoj venis al Pekino. Post longa atendado ili estis loĝigitaj en la Amikeca Hotelo, kiu donis ĉambrojn al ili nur post kiam aliaj gastoj forlasis ĝin. Pasuminte duontage en la Amikeca Magazeno, ili informiĝis, ke ili enĉambrigos nur je la 23-a h. Tiam en Pekino estis nur kelkaj hoteloj kompare luksaj, en kies vestibloj ofte vidiĝis alilandaj turistoj bezonantaj enloĝigon. Oni multe plendis pri okupateco de la hoteloj. Fakte en 1978 Pekino akceptis nur 190 000 eksterlandajn turistojn.

En 1978, Ĉinio malfermis sian pordon al la mondo kaj fondiĝis en Pekino turisma administrantaro. En la sekva jaro ekfunkciis en Pekino turisma-aŭta kompanio. En 1980 en Pekino oni ekkonstruis Jianguo-hotelon investitan kune de Ĉinio kaj Japanio. En 1983 ekfunkciis la Hotelo Changcheng investita kune de Ĉinio kaj Usono. En 1988 ekfunkciis Kunlun, la plej alta hotelo en Pekino. En 1989 estis finkonstruita Wangfu, la plej luksa hotelo de Pekino. Nun en Pekino funkcias 96 altklasaj hoteloj kun pli ol 40 000 ĉambroj, 56 turismaj servoj kaj pli ol 110 000 diversspecaj turismaj aŭtoj.

Dank' al la konstruo de turismaj ekipaĵoj, la turismaj aferoj multe

disvolviĝis en Pekino. En la 10 jaroj ekde 1978 Pekino akceptis entute ĉ. 7 000 000 fremdlandajn turistojn kaj enspezis 2.8 miliardojn da usonaj dolaroj. Evidente, turismo fariĝis pli kaj pli grava por disvolvi la ekonomion de Pekino. La turismo ne nur alportas al Pekino multe da financa profito, sed ankaŭ, kaj pli grave alportas al Pekino pli da moderna civilizacia konscio, kio tre utilas al la moderna lingvo de tiu antikva urbo.

En la 70-aj jaroj sur stratoj malofte vidiĝis alilandanoj kun blondaj haroj kaj bluaj okuloj, sed hodiaŭ, ili estas neniom strangaj por la pekinanoj. Renkontante surstrate, iafoje oni salutas ilin. Gejunuloj eĉ interparolas kun ili en fremda lingvo.

Nun hoteloj arbare staras en Pekino. Iliaj administrantoj prenis taŭgajn rimedojn pro konkurenco. Antaŭe, la turismo en Pekino kun politika koloro subtaksis la profiton, aŭ pro politika bezono aŭ sole pro amikeca kontaktiĝo. Ekz. Xiyuan (Ŝijijuan)-hotelo antaŭe funkciis kiel altklasa akceptejo, ĉefe por alilandaj amikecaj delegacioj, specialistoj kaj erudiciuloj de internaciaj konferencoj. Tiam, la administrantoj de la hotelo ne bezonis zorgi pri gastoveno, nek pri profito, ĉar tiam estis malmultaj hoteloj en Pekino. Aplikinte la konkurencajn rimedojn, ili ne plu "pasive atendas la gastojn en la

hotelo", sed "aktive serĉas gastojn". Kaj plie ili establis agentejojn en aliaj provincoj por venigi gastojn al si, tial la hotelon ĉiam vizitas sufiĉe da gastoj. Fakte, ĉiuj hoteloj de Pekino aranĝas novan servon por allogi pli multe da gastoj. Ekz., la Pekina Hotelo aranĝis vendan ekspozicion de ĉinaj silkaĵoj unu-monatan; la Hotelo Granda Muro koncentre vendas Pekingustajn manĝaĵojn; Huadu-hotelo okazigis la Ekspozicion pri Popularaj Maskoj. Ĉio ĉi ne nur oportunigis la gastojn, sed ankaŭ riĉigis la enhavon de ilia vojaĝo kaj pliigis profiton por la hoteloj.

En 1988, okazis en Pekino la internacia turisma jaro. Tiujare, Pekino faris al la alilandaj turistoj 28 grandskalajn aktivadojn inkl. de malfermo de la Tian'anmenturo al turistoj. Tian'anmenturo estas simbolo de la nova Ĉinio kaj la loko, kie la ŝtataj gvidantoj revuas la manifestaciojn en festotagoj. S-ro Richard Karl el Nov-Orleano, Usono, estis la unua turisto, kiu suriris la turon. Li diris kun emocio, ke li vidis de sur la turo la plej grandan placon de la mondo.

Malgraŭ ke la pekina turismo prosperas, ekzistas ja ne malmultaj problemoj, ekz., iuj taksistoj pagigas ne laŭ taksometro; iuj etkomercistoj trude ofertas siajn varojn al turistoj k.a. Tio postulas bonan medion en Pekino por ke la turistoj povu ne nur rigardi grandiozajn historiajn restaĵojn kaj belajn naturajn pejzaĝojn, sed ankaŭ ĝui modernan civilizacion. En 1987 la Pekina Turisma Buroo faris la konkurson de bona servo kaj postulis, ke ĉiuj laborantoj de la turismaj servoj havu koncepton ke la plej altaj estas la turistoj por havigi al la turistoj komfortan medion. Ankaŭ en la tuta socio disvolviĝas la eduko de la civilizacia etiketo. Pekino kun etenditaj brakoj fervore akceptas pli multe da turistoj. Pekino varme bonvenigas ĉiujn partoprenantojn de la Azia Sportkunveno en 1990. ■

Rejuniĝas kavernaro

Teksto kaj fotoj de DI XIANGHUA

ŜTONKAVERNARO, forgesita dum 300 jaroj, nun refoje montras sian brilan belon. Ĝi troviĝas ĉe la oriento de Xumi- (Ŝjumi)-monto, 55 kilometrojn nordokcidente de la guberni-urbo Guyuan de la Ningxia-a Hui-nacia Aŭtonoma Regiono, Ĉinio. Pro manko de registro en historia literaturo kaj pro sia situo en fora regiono, kie maloportunas la trafiko, ĝi estas malmulte konata. Erozio kaj detruo de homoj dum jarcentoj kaŭzis ĝian kadukon. Hodiaŭ en multaj kavernoj ne videblas eĉ signeto de budhaj statuoj kaj freskoj. El 130 kavernoj nur pli ol 20 havas en si statuojn.

En 1984 taĉmento por antikvaj konstruoj venis ripari tie la kavernaron. En la lastaj kvin jaroj la ŝtato asignis al ĝi 2.55 milionojn da juanoj. En riparado oni strikte observis la principon de "nedifekto de nuna formo de historiaj objektoj". Nun oni jam finriparis 7 kavernojn, kies muroj antaŭe jam falis, restaŭris 3 statuegojn, konstruis unu templon, masonis ŝtupar-vojon, forigis rubojn, plantis pinojn kaj cipresojn, kaj dragis drenubojn. En tute nova aspekto la kavernaro de Xumi-monto malfermiĝis al publiko en la 1-a de oktobro 1988.

"Xumi" estas ĉina transskribo de la sanskrita *Sumeru*, kiu signifas miraklan altaĵon. La kavernoj troviĝas ĉe la mezo aŭ malsupro de krutaĵoj. Oni nomas kelkajn kavernojn la Turo de Granda Budho, Ida Palaco, Aŭreola Templo, Persikflora Groto k.a. La kavernaro etendiĝas 2 kilometrojn laŭ

zigzaga montodeklivo. La fosado de kavernoj, kiu komenciĝis en la Norda Wei-dinastio (386-534), daŭris ĝis 960 tra kelkaj dinastioj. La kavernoj fositaj en Tang-dinastio (618-907) estas pli multaj ol en ajna alia dinastio.

"La Ida Palaco", la centro de la kavernaro, estas la unua fosita; kaj la posta kavernofosado iris de tie suden kaj norden. "La Ida Palaco" estas tipa kaverno de la Norda Wei-dinastio: La planko estas kvadrata, la pordo rigardas sudorienten, je la centro staras kvadrata kolono, sur kiu estas reliefaj figuroj de la budho, bodisatvoj, muzikludantoj k.a., sur la muroj estas figuroj de la budho kaj bodisatvoj, kaj sur la supro gravuriĝas flugantaj feoj. Kvankam la kapoj de multaj statuoj estas perditaj aŭ difektitaj, tamen ili klare sentigas siajn ekzotajn trajtojn. La sveltaj sta-

tuoj de la budho kaj bodisatvoj havas larĝan frunton, malgrasan vizaĝon, altan nazon, longajn brovojn kaj okulojn, buŝeton kun maldikaj lipoj, longan kolon kaj mallarĝajn ŝultrojn. Ili similas pli al hindoj ol al ĉinoj. Kredeble, ili estis skulptitaj ne longe post la enkonduko de budhismo en Ĉinion.

En la Norda Zhou-dinastio (557-581) la kavernaro jam etendiĝis al la nunaj Aŭreola Templo kaj Xiangguo-templo, kiuj estas la kvintesenca de Xumi-monto, ĉar tie sidas la plej multaj, plej grandaj kaj rafinitaj ŝton-skulptaĵoj de tiu dinastio. Tipa estas la kaverno n-ro 51. Ĝi havas antaŭhalon, dekstran kaj maldekstran flank-ĉambrojn kaj kvadratan kolonon centre de la ĉefĉambro. La ĉefĉambro estas 12 metrojn alta kaj 18 metrojn profunda. Gravaj statuoj ĉiuj estas pli ol 6-metraj. Kun malalta kaj plata

La Aŭreola Templo



hartubero, ronda vizaĝo, larĝaj ŝultroj kaj konvekso ventro, tiuj statuoj manifestas la solidan stilon siatempan. Ili estas gloritaj kiel la lumo de Xumi-monto.

Kavernoj de Tang-dinastio laŭ sia eksteraĵo imponas per la grandiozeco de tiu tempo. La internaj aranĝoj multe ŝanĝiĝis. La tiama kaverno, kvankam kvadrata, ne havas kolonon ĉe sia centro. Ĝi aspektas kiel vasta korto, kiu furoris ekde 206 a.K. Iuj kolosaj statuoj estis faritaj tiamaniere, ke oni forhakis parton de monto kaj ĉizis la statuojn laŭ rokmuroj. Antaŭ kaj super tiuj statuoj lokiĝas ligna konstruaĵo. Ĝenerale, statuoj metiĝas sur terasoj antaŭ la muroj, kaj la oftaj statuoj estas tiuj de Budho, du bodisatvoj, du budho-disĉiploj (*Ŝsya*) kaj du diaĵ-gardantoj (*vajroj*). Budho, sidante sur lotusflor-forma soklo kun unu aŭ du genuoj fleksitaj, montras afablon kaj trankvilon sur la plena vizaĝo, kaj surhavas *kasajon* (budhistan robon) kun flu-liniaj faldoj. Bodisatvoj en virinaj figuroj havas unu manon sur sia brusto kaj tenas botelon en la alia mano. Ili estas grasetaj kun dolĉa rideto sur la maldikaj lipoj kaj la longaj brovoj kaj okuloj. Ili havas aŭ altan hartuberon aŭ diademon, portas rozarion antaŭ la brusto kaj ĉe la manradikoj brakringojn. Ĉu laŭ la mieno ĉu laŭ la vesto, ili tre similas al la luksaj kaj ĉarmaj nobelinoj en siatempaj freskoj. Du disĉiploj staras flanke de bodisatvoj kaj la diaĵ-gardantoj staras plej ekstere. La statuoj en diversaj pozoj plene montras la senprecedencan perfektion de la tiama skulpturo.


La plej granda statuo ĉizita sur rokmuro estas la 20.6-metra Majtrejo sidanta en la kaverno n-ro 5. Kun spiral-forma hartubero sur la verto, plena vizaĝo, ŝultrotuŝantaj longaj oreloj kaj la manoj sur la genuoj, ĝi en *kasajo* sentigas trankvilon, teneron kaj afablon. Ĝi estas tipa verko de la posta periodo de Tang-dinastio kaj simbolo de la kaverno.



Budhostatuo (Tang-dinastio)



La kapo de budhostatuo
(Norda Zhou-dinastio)




Statuo de Majtrejo (Tang-dinastio)

Statuoj en kaverno (Norda Zhou-dinastio)



Statuo de bodisatvo (Norda Zhou-dinastio)



KONTRIBUU POR LA RUBRIKO "MI KAJ ĈINIO"

Karaj legantoj

Por festi la 40-jariĝon de EPC en la venonta majo, ni petas vian kontribuon por la rubriko "Mi kaj Ĉinio".

Vi povas verki pri: impreso pri Ĉinio, amika kontakto kun ĉinoj aŭ ĉinaj esperantistoj, amikeco kun EPC ktp. Via artikolo povas esti en ajna stilo aŭ formo, sed ne pli-ol-tri-paĝa (laŭ la formato de EPC). Bonvenaj estas koncernaj fotoj (inkl. de portreto de la aŭtoro). Limdato: la 31-a de januaro 1990 (laŭ vialoka poŝtstampo).

Ni aperigos bonajn verkojn el la kontribuajoj en EPC. Ni aljuĝos la unuan premion al 1, duan premion al 3 kaj trian premion al 5 kontribuintoj. La premioj estos ĉinaj metiartaĵoj. Nepremiitaj kontribuintoj ricevos donaceton.

La rezulto de la aljuĝo legiĝos en la 6-a numero de 1990.

Ni anticipu dankas vin por la kunlaboro.

La Red.

INTERVJUOJ

Lertulino pri silkaj homfiguroj

de ZHENG ZHENJIE

PROKSIME de Qianmenpordego, Pekino, troviĝas fabriko de silkaj homfiguroj. Tie mi vizitis metiartistinon Yang Naihui.

Ĉe la unua rigardo mi preskaŭ ne kuraĝis kredi, ke Yang Naihui, kiu staris antaŭ mi, aĝis 45 jarojn. Ŝi aspektis tre juna kaj bela same

kiel silka homfiguro farita de ŝi.

Yang Naihui diris al mi, ke ŝi vivas en Pekino de la infaneco. Kiam ŝi estis infano, ŝi ŝatis tolpupon. Ŝi ne volis ĝin forlasi eĉ dum dormado, manĝado kaj irado. Yang Naihui mem ne scias, kial ŝi tiel ŝatas pupojn. Ŝi memoras nur, ke ŝi jam komencis fari tolpupon, kiam ŝi estis 4-5-jara. Ŝi faris por ĝi veston el tolpecoj kaj harplektaĵojn el nigraj fadenoj. Ŝi tamen ne atendis, ke ŝia kariero komenciĝis de tolpupo.

Aŭtune de 1962, Yang Naihui diplomiĝis el la skulptura fakulo de la Pekina Metiarta Lernejo kaj eklaboris kiel praktikanta teknikistino en jadaĵlaborejo de metiarta fabriko. Fronte al abundo da belaj jadaĵoj, ŝi tamen rememoris fojfoje pupojn ŝatatajn de ŝi en la infaneco.

Iutage, ŝi vizitis la Rondan Ur-

Yang Naihui (maldekstre) kaj ŝia metilernantino



bon en Beihai-parko de Pekino. La silka artaĵo "Amo de Patrino" forte allogis ŝin: La juna patrino sidas sur la ŝtona benketo kun la dormanta bebo en la sino. La patrino frapetas ĝin. La mieno kaj rigardo implicate kaj profunde esprimas la patrinan amon. Yang Naihui ĝin rigardis ekstaze. Kiam ŝi eksciis, ke la aŭtoro de la artaĵo estas Ge Jing'an, la plej fama projektisto de Ĉinio tiuflanke, ardiĝis ŝia deziro longtempe kaŝita en la koro. Yang Naihui do forlasis la laborejon kaj fariĝis metilernantino de Ge Jing'an. Ekde tiam ŝi sin dediĉis al la arto de silkaj homfiguroj.

La arto de silkaj homfiguroj de Pekino estas evoluinta de la popola puparto de Tang-dinastio (618-907 p.K.). En 1954 Ge Jing'an partoprenis en la "Internacia Infanpupa Konkurso" en Hindio, en kiu la kvin silkaj figuroj de nacimallimultaj virinoj, faritaj de Ge Jing'an, estis alte taksitaj. De tiam la arto de silkaj homfiguroj altiris atenton de la ĉina registaro. Nun li aĝas pli ol 80 jarojn kaj ne plu okupiĝas pri la arto. Yang Naihui daŭrigis lian karieron kaj fariĝis projektistino pri silkaj homfiguroj.

En la eksponejo de la fabriko Yang Naihui montris al mi siajn silkajn homfigurojn. La seriozaj kaj belaj knabinoj, entuziasmaj hispanaj junulinoj, Neĝulino kaj bodisatvoj ĉiuj estas fruktoj de ŝia peniga laboro kaj montras ŝian grandan amon al sia kariero. Ŝi diris: "Mi dediĉas min al la arto ĝuste el la amo."

Kiam la elektronika varmo envolvis la fabrikon, tiu ĉi decidis produkti elektronan materialon anstataŭe. Sed Yang Naihui neniel volas forlasi la arton. Ŝi petegis, ke la fabriko ne produktitan materialon. Finfine ĝi denove komencis produkti silkajn homfigurojn. Tiutempe la fabrikdomo konsistis el nur du malvastaj ĉambroj, kiuj servis kiel projektejo, laborejo kaj tenejo. Tamen ĉio ĉi estis nenio por Yang Naihui.

Ĝuste kiam ŝi sin dediĉis al la

arto, gvidanto de la fabriko diris: "Ŝtrumpojn ĉiuj bezonas, sed silka homfiguro ne estas necesa por ĉiuj." Sekve la fabriko decidis produkti ŝtrumpojn. Tamen Yang Naihui ankoraŭ deziris disvolvisian arton, se eble. Poste, ŝia deziro efektiviĝis.

Por fari silkajn figurojn de 12 kromedzinoj de imperiestro de Qing-dinastio (1644-1911), ŝi foje refoje vizitis la Imperiestran Palacon en vintro. Tie ŝi atente rigardis kaj pentris la portretojn de la kromedzinoj. La vestoj, kapornaĵoj kaj mienoj de la kromedzinoj estis kaptitaj en ŝian koron. En ŝia kajero vidiĝas centoj da portretoj de la kromedzinoj. Yang Naihui diris al mi, ke foje, kiam ŝi vizitis la Imperiestran Palacon, altvalora krono allogis ŝin. Ĝin ŝi rigardis kaj rigardis. Tamen laŭ regulo, estis malpermesite ĝin pentri kaj fotografi. Ŝi do prenis siajn okulojn kiel "fotografilon" kaj "fotografis" la kronon.


Mi informiĝis de Yang Naihui, ke laŭ la tradicia arto la kapo de silka homfiguro devas esti ligna aŭ argila. Sed Ge Jing'an faris silkan homfiguron kun drato kiel ostoj, kotono kiel muskolo, gazo kiel haŭto kaj silko kiel vesto. La figuro pli similas al vera homo. Heredinte la arton de sia majstro, ŝi iom post iom formis sian stilon. La silkaj homfiguroj faritaj de ŝi vikle mienas, kun brilanta haŭto kaj vivovera koloro. La silka figuro de "Bodisatvo en Huayan-templo" estas unu el ŝiaj ĉefverkoj. Bodisatvojn ŝi vidis en templo, tamen tiuj bodisatvoj estas preskaŭ samaspektaj. Por Yang Naihui estas tre facile imite fari silkan figuron de bodisatvo, sed ŝi ne volas tion. Ŝi provis sin liberigi el la kateno de la tradicia modelo kaj krei novan figuron de bodisatvo kun budha kaj homa karakteroj, por ke ĝi estu adorato kaj simbolo de feliĉo. Yang Naihui fosadis en historiaj libroj kaj rigardadis famajn pentraĵojn ĉinajn kaj alilandajn. Ŝin edifis la gracio de peoniaj feinoj, la rideto de Mona Lisa kaj la senlima



Bodisatvo de Huayan-templo


amo de hindia knabino. Finfine, ŝia laborado kroniĝis per sukceso. La silka figuro de "Bodisatvo en Huayan-templo" faris sensacion dum la eksponado. Ĝi, klarstria, gracie mienas, kun budha karaktero kaj homa sincereco.

Nun Yang Naihui famas en la ĉinaj metiartistaj rondoj. Ŝiaj silkaj homfiguroj plurfoje ĝajnis premiojn donitajn de la fabriko kaj la ŝtato. Nun ŝiaj verkoj bone vendiĝas en la enlanda merkato. La artaĵoj "Pavodanco de Tajoj", "Ventumildanco de Koreoj", "87 Feoj" kaj "Bivoludantino de Tang-dinastio" estas tre ŝatataj de la aĉtantoj. Ŝiaj silkaj homfiguroj faritaj imite al personoj en la ĉina klasika romano "Songo en Ruĝa Buduaro" estis eksponataj en Usono. Tamen ŝi ne kontentas pri sia sukceso, dirante: "Arto estas senlima. Ĉiufoje, kiam mi projektas novan silkan figuron, mi konsultas fakulojn."



Manekenoj

Baletistino



Avalokitesvaro






La antikva muziko "Tepropono" ludata ĉefe per ĝeng-oj kaj liroj

Sursceniĝis la ĉina antikva kortega muziko

Teksto de **OU CHUNLAN**

Fotoj de **HAI FENG**

Prezentado en ĝardeno de la Imperiestra Palaco



Ludo de flutoj kaj ŝeng-o



LA ĉina kortega muziko havas pli ol trimil jarojn. “Libro de Poezio”, la plej frua poezia kolekto de Ĉinio, nombras multe da poemoj, kiuj priskribas pompon de la kortegaj kulturo kaj bankedo akompanataj de muziko. Ekde la imperiestro Udi (156-87 a. K.) de Han-dinastio, kiu starigis kortegan oficejon *juefu*, speciale administrantan la aferojn de komponado, kolektado kaj prezentado de muziko, ĉiu dinastio havis sian kortegan oficejon pri muziko. En la plej prospera periodo de Tang-dinastio la kortega muziko atingis sian kulminon. La imperiestro Xuanzong (685-762 p.K.) estis muzik-ŝatanto. Kiam li donis bankedon, muzikistoj ludis tamburojn, kies sono disvastiĝis tre malproksimen. Qing-dinastio, la lasta feŭdisma dinastio de Ĉinio, heredis la kortegan muzikon de la antaŭaj dinastioj kaj samtempe sorbis folklorajn muzikojn kaj tiujn de naciminoritatoj. Kaj tiel pli perfektigis la kortega muziko. La kortega muziko kiel parto de la ĉina tradicia kulturo kaj tiu de la kortega vivo ekzistis ĝis la fino de la feŭda socio de Ĉinio.

Troviĝas multaj historiaj notoj pri kortega muziko, tamen rare konserviĝas nun muziknotoj. La nunaj programeroj ĉefe venas el la arkivaj dokumentoj de la Muzeo de Imperiestra Palaco en Pekino kaj de sinjoro Pu Xuezhai, specialisto de kortega korda muziko. Li naskiĝis en imperiestra familio en 1893. Li dediĉis sin al la esplorado kaj ludado de nacia kaj kortega muziko. Li persone instruis al la fama ludisto de trikordo Zhou Runming ludi kortegajn muzikaĵojn.

La kortega muziko de Qing-dinastio povas esti dividita kategorie en du partojn: ceremonia kaj amuza, aŭ muziko por la ekstera parto de la kortego kaj tiu por la interna parto de la kortego. Ili estis enhavoriĉaj, longhistoriaj kaj karakterizitaj per ĉarmo, delikateco, eleganteco kaj seriozeco. Por ludi kortegan muzikon oni uzas ĉinajn



Zhou Runming ludas trikordon.

antikvajn kordajn instrumentojn, kiaj antikva liro, ĝengo, kaj trikordo, blovinstrumentojn, kiaj *ŝjun* (ovoforma kun ses truoj, farita el argilo), pajnoŝalmo, fluto, *ŝengo*, kaj frapinstrumentojn, kiaj gamosonorilaro, jadgamo kaj gonga grupo.

La ĉina kortega muziko, kvankam monopoligita de la plej superaj feŭdaj regantoj dum miloj da jaroj, sed tamen ne perdis siajn karakterizojn de ĉina nacia muziko. Por daŭrigi la kortegan muzikon de diversaj dinastioj, la Ĉina Disaŭdiga Ensemblo kaj kelkaj aliaj artistaj grupoj funkciigis la Ĉinan Korteg-muzikan Asocion. Zhou Runming funkcias kiel ĝia estro, la asocio kolektis al si multajn famajn ludistojn tra la lando. Antaŭ nelonge la asocio okazigis premieron en Pekino, donante al ordinaraĵoj civitanoj ŝancon apreci preskaŭ malaperintajn muzikaĵojn, kiujn ĝuis nur imperiestroj.

La scenejo estis dekoraciita laŭ palaca maniero. La muzikistoj en kostumo de Qing-dinastio ludis diversajn antikvajn instrumentojn. Tio donis al spektatoroj tian impreson, kvazaŭ ili estas en la mistera imperiestra palaco.

“Dan Bi Da Yue” estas muzikaĵo ludata en la antaŭa parto de la palaco. Oni ludis ĝin tiam, kiam oficistoj faris surgenuan riverencon al la imperiestro. La majesta kaj subprema tamburado estas ĝia toniko, kaj la blovinstrumentoj ludas lantan kaj superban melodion, kio bildigis pacan socion. “Huang Du U Wan” estis muzikaĵo ludata ĉe ekiro de vojaĝo de imperiestro. Ĝi estis ludata kun akompano de kantado kaj dancado. La muzikaĵo, delikate polurita kaj fajnigita de muzikistoj, estas belsona kaj milda. *Ŝjun* estas blovinstrumento kun sono proksima al homa voĉo. Ĝi povas esprimi tristan senton, kiaj ploro kaj plendo. En kunludo *ŝjun* sonas karakterize. Imperiestro prenis ĝin kiel la ĉefan instrumenton en muzikaĵo “Bonvenigo de Dio” ludata en ĉielkulta ceremonio, kio montras la solecon kaj van-tecon en la spirito de imperiestro.

Prezentado de la ĉina kortega muziko valoras pro ĝiaj arteco, apreco, referenceco kaj studindeco. Ĝi donas ne nur materialon al muzikistoj por studi kaj referenci, sed ankaŭ riĉigas la kulturan vivon de ordinaruloj. ■

Wang Shifu kaj “La Okcidenta Ĉambro”

de MEI ZHI

EN Yuan-dinastio (1279-1368), krom Guan Hanqing, ankaŭ Wang Shifu, Bai Pu kaj Ma Zhiyuan, estis famaj dramistoj, kiujn oni honore titolis per la kvar majstroj de zaĝju-opero de Yuan-dinastio.

Wang Shifu kaj Guan Hanqing vivis en la sama epoko. Wang vivis pli ol 60 jarojn kaj verkis 14 operojn, kiuj plejparte estis perditaj. Tamen lia opero “La Okcidenta Ĉambro” faris lin mondfama por eterne.

“La Okcidenta Ĉambro” estis eksterordinara el la zaĝju-operoj en Yuan-dinastio. Zaĝju-opero ĝenerale havas unu parton el kvar aktoj. Ankaŭ estas iuj zaĝju-operoj konsistantaj el 2 partoj kun ok aktoj. “La Okcidenta Ĉambro” ja havas 5 partojn el 21 aktoj. Ĝi prezentas unu rakonton per pluraj partoj. Tio estis iniciativo siatempe.

“La Okcidenta Ĉambro” rakontas la amaferon de juna klerulo Zhang Gong kaj nobela fraŭlino Cui Yingying. La rakonto cirkulis en Ĉinio jam longajn jarojn. En Tang-dinastio (618-907), post kiam literaturisto Yuan Zhen verkis legendan novelon “Biografio pri Yingying”, pluraj personoj verkis poemojn, ci-ojn kaj muzikaĵojn laŭ la enhavo de ĝi. En Jin-dinastio (1115-1234) aperis kompare kompleta opero “Rakonto-kantado pri la Okcidenta Ĉambro” verkita de s-ro Dong. Ĝuste surbaze de tio naskiĝis “La Okcidenta Ĉambro” de Wang Shifu, senmorta verko en la ĉina teatra historio.

Kun ŝanĝigemaj intrigoj “La Okcidenta Ĉambro” prezentas kompleksajn teatrajn konfliktojn, klarajn personajn karakterojn kaj fortan kontraŭfeŭdisman koloron. Je la komenco de la zaĝju-opero, juna klerulo Zhang Gong, kiu iris al la ĉefurbo por la ŝtata ekzameno, preterpasis Pujiu-(Puĝiŭ)templon kaj ĉe la budha halo renkontis Yingying, filinon de la forpasinta ĉefministro Cui, loĝantan en la okcidenta ĉambro de la templo. Tuj je la unua vido ekamis la du gejunuloj unu la alian. Zhang do ekloĝis en la templo kaj ĉesigis sian vojaĝon al la ĉefurbo por la ŝtata ekzameno. La juna paro deklamis siajn poemojn en kaj ekster la ĝardeno por esprimi sian korinklinon unu al la alia. Zhang intervidiĝis refoje kun Yingying, utiligante la ŝancon, ke sinjorino Cui (t.e. la patrino de Cui Yingying) faras diservon por

la forpasinta edzo. Nelonge post tio, generalo Sun Feihu sieĝis la templon, kun 5000 soldatoj sub sia gvido, kaj volis preni Yingying kiel sian edzinon. Sinjorino Cui anoncis, ke ŝi edzinigos sian filinon al tiu, kiu forpelos la sieĝantojn. Tiam Zhang Gong brave eliris por plenumi la taskon. Artifike li prokrastigis la atakon de Sun Feihu kaj samtempe skribis leteron al sia amiko Du Que (Du Ĉjue) por peti savan trupon. Du Que gvidante sian trupon senprokraste alvenis al la templo kaj kaptis Sun Feihu. Tiam oni opiniis, ke realiĝos la deziro de la juna paro. Sed neatendite la afero ŝanĝiĝis abrupte: Sinjorino Cui invitis Zhang al festeno kaj ordonis, ke Yingying



intervidiĝu kun li kiel fratino, dirante, ke ŝi antaŭe jam promesis edzinigi Yingying al sia nevo Zhang Heng. Zhang estis malĝoja. Pri tio grumblis eĉ Hongniang, servistino de la fraŭlino. Ŝi konsilis, ke Zhang ludu kordan instrumenton nokte por sondi la koron de Yingying. Aŭdinte la aman muzikaĵon, Yingying estis multe kortuŝita.

En la tria kaj kvara partoj de la opero la intrigo atingis sian kulminon de la disvolvigo. Interalie, la psikaj priskriboj pri la personoj estis tre delikataj, ankaŭ la intrigoj evoluigis kulminojn unu post alia kaj multe interesas la spektantojn. Post kiam la sinjorino perfidis sian promeson pri la edziniĝo, Yingying falis en kontraŭdiran animstaton. Unuflanke ŝi antipatiis la konduton de sia patrino kaj aliflanke ŝi ne kuraĝis malobei la ordonon de sinjorino Cui. Influate de la feŭdisma etiko ŝi ofte estis pruda eĉ antaŭ Hongniang. Ŝi sendis Hongniang al la malsana Zhang por lin konsoli. Post kiam tiu revenis kun letero de Zhang, ŝi estis ĝoja en la koro, tamen afektis sin kolera kaj riproĉis Hongniang: "Bubinaĉo, de kie venas tio? Mi estas filino de la ĉefministro, kiu kuraĝas petoli kun mi per letero." Ŝi skribis respondan leteron kaj ordonis, ke Hongniang portu ĝin al Zhang. Aŭdinte plendon de Hongniang, Zhang deprimiĝis. Sed leginte la leteron, li eksciis, ke la fraŭlino invitas lin al rendevuo. Tiu nokte invite, Zhang transgrimpis la muron. Vidinte lin, Yingying subite bolis de kolero kaj riproĉis lin. Tio forte hontigis la pedantan Zhang kaj de tio li grave malsaniĝis. Poste Yingying kaj Zhang Gong kaŝe decidis sian interfianĉiĝon helpate de Hongniang kaj varme amis unu la alian.

Hongniang estas grava persono en "La Okcidenta Ĉambro". Ŝi, malalta en la socia pozicio, kondutis decideme kaj kuraĝe. Kiam sinjorino Cui rimarkis la sekreton inter Zhang kaj sia filino, tiuj falis en maltrankvilon, sed Hongniang estis aplomba. Kiam sinjorino Cui pridemandis Hongniang, ŝi aplombe eldiris la sekreton kaj aŭdace montris, ke la sinjorino perfidis sian promeson kaj kondutis maldece. Hongniang faris rebaton per familia regularo ĉiamaniere gardata de la sinjorino mem, dirante "Se nun via sinjorino moŝto ne lasus pasi la aferon, vi makulus la honoron de la ĉefministra domo... Se vi prezentus la aferon al juĝejo, vi estus kulpigota pro malzorgo pri disciplino en edukado al la infanoj." Ŝia akra kontraŭparolo mutigis la sinjorinon, kiu devigite konsentis la geedzecon. Hongniang estis ŝlosila persono en la amafero de la juna paro. Sen ŝi la fraŭlino ne povus rompi la feŭdisman katenon.

Sinjorino Cui konsentis ilian edzecon sub la premo, ke Zhang Gong devas iri al la ĉefurbo por la ŝtata ekzameno kaj gajni rangon de ŝtata oficisto. En la sceno pri adiaŭo eĉ la kiosko Changting Yingying akompanis Zhang ĝis la kiosko kaj kun bedaŭro adiaŭis sian amaton. La sceno estis malĝojiga kaj kortuŝa:

Lazuras la ĉielo,

*flavas je floroj l' tero;
en sibla vento flugas
al sud' sovaĝanseroj.
Kio ruĝigis la foliojn de aceroj?
La larmoj pro disiĝĉagreno.*

*Ni tro malfrue havis intervidon,
Tro frue trafis la disiĝ-subiton.
La longaj plorsalikaj frondoj
ne povas ĉevalbride lin deteni,
kaj la arbar' maldensa
ne povas la subiran sunon ekkateni.
Lia ĉevalo antaŭiru lante,
mia kaleŝ' rapidu lin sekvante.
Apenaŭ nia amtabuo venis al likvido,
alproksimiĝas jam la hor' por dir' de ĝis-revido.
Je aŭdo de "adiaŭ" mia bracelet' largiĝis,
je vido de l' Kiosk' Deklia mi magriĝis.
Ja kiu nun divenas, ke mi tristoplenas?*

Tiuj belaj liriko estas multe kortuŝaj kaj vekas profundan simpatian ĉe la spektantoj.

Post duonjaro de kiam Zhang Gong venis al la ĉefurbo, li sukcesis en la ŝtata ekzameno kaj tuj sendis raporton tion al sinjorino Cui. Yingying kompreneble estis tre ĝoja. Ŝajne, la heroo kaj heroino baldaŭ kunvivis feliĉe! Neatendite la afero denove falis en implikon. Zhang Gong ial ne povis tuj forlasi la ĉefurbon kaj tiutempe Zheng Heng alvenis kaj volis edziĝi al Yingying laŭ la antaŭa promeso. Informiĝinte, ke la sinjorino promesis edzinigi sian filinon al Zhang Gong, Zheng do mensogis, ke Zhang havas edzinon en la ĉefurbo, pro kio li ne revenis. Tion aŭdinte, sinjorino Cui koleris kaj promesis edzinigi al li Yingying. Post kiam Zhang Gong revenis, la tuta familio traktis lin apatie. Tiutempe la generalo Du Que alvenis por prezidi la geedziĝan ceremonion kaj malkaŝis la mensogon de Zheng Heng. Nur tiam forvaporigis la miskompreno. Zhang Heng sin mortigis pro honto. Zhang Gong kaj Yingying fine geedziĝis post venko de multaj malfaciloj.

La grandsukcesa "La Okcidenta Ĉambro" ne nur profunde influas la literaturon kaj arton de Ĉinio, sed ankaŭ vekis grandan eĥon en la socio. Ĝi kuraĝigis la gejunulojn, kiuj estis forte katenitaj de la feŭdismaj etiko kaj moralo kaj volis frakasi la katenon. Ĝuste pro tio tiu multe ŝatata opero iam estis malpermesita de feŭdaj regantoj.

Bai Pu estis alia fama dramisto en Yuan-dinastio. Li verkis brilan operon "Li Qianjin kaj Pei Shaojun" Li Qianjin (Li Ĉjanĝin), filino de riĉulo, vidis Pei Shaojun (Pej Ŝaŭĝjun), filon de iu kortegano, kaj ekhavis amon al li. Ne volante atendi la oficialan edziĝpeton de Pei Shaojun post ties altranguliĝo, Li Qianjin kaŝe foriris kaj ekkunvivis kun Pei Shaojun. Post sep jaroj ili estis arbitre disigitaj de la kortegano Pei, patro de Pei Shaojun. Fine ili kunvivis denove. La dramisto majstre priskribis la fraŭlinon Li Qianjin. Kvankam ŝi estis filino de nobela familio, tamen

estis aŭdaca. Ŝi kuraĝis ne nur eksterleĝe kunvivi kun sia amato, sed ankaŭ disputi kun defendantoj de feŭdisma etiko. Ŝi estis multe pli kuraĝa ol Yingying, la heroino de “La Okcidenta Ĉambro”.

Dramisto Ma Zhiyuan de Yuan-dinastio postlasis sep operojn, el kiuj “La Aŭtuna Palaco de Han” estas eminenta opero pri Wang Zhaojun (Ŭang Ĝaŭĝjun). Laŭ historia kroniko en la regado de la imperiestro Yuandi de Han-dinastio, huna ĉefo Ĉanju alvenis por peti edzoliĝon, Zhaojun memvole iris al Huno por fortigi la unuiĝon inter la nacioj Han kaj Huno. “La Aŭtuna Palaco de Han” ne estis katenita de la historiaj detaloj kaj emfaze priskribas, kiel la imperiestro Yuandi arde amas la belulinon Wang Zhaojun. Komence, Yuandi ordonis Mao Yanshou elekti popolajn belulinojn por la imperiestra palaco. Mao trovis Wang Zhaojun. Wang estis belega knabino. Ĉar ŝi ne volis subaĉeti Mao, tiu do faris artifikon sur ŝia portreto prezentota al la imperiestro. Pro tio Yuandi preteratentis ŝin. Iun nokton Yuandi aŭdis ŝian mornan plukadon de korda instrumento. La imperiestro vidis ŝin kaj amis ŝin profunde. Poste, Mao prezentis la portreton de Wang al la huna Ĉanju, tiu do insiste petis Wang

Zhaojun de la imperiestro Yuandi. Yuandi kontraŭvole konsentis. Kiam Wang venis al la rivero Heilongjiang (Hejlongĝjang), ŝi sin ĵetis en la riveron kaj mortis. La opero priskribas la sopiron de la imperiestro Yuandi pri Wang post ŝia foriro. En teatraĵo la raŭkaj krioj de soleca ansero faris la scenon pli trista kaj kortuŝa:

*Jam de tre longa tempo maltrankvilas mia koro,
aldone min ĝenadas jen birdaĉo en ĉi horo.
Ĝi krias tra la frosta nokto,
jen en langvoro,
jen kun fervoro,
blekante super mi ĝi flugas ronde,
kaj tie ĉi ĝemadas mi responde.
Por misordigi la sezonojn tia kunlaboro?!*

En Yuan-dinastio troviĝis ankaŭ aliaj dramistoj, ekz., Kang Jinzhi (Kang Ĝingi) kaj Gao Wenxiu (Gaŭ Ŭenŝiŭ), kiuj famiĝis pro siaj verkoj pri la ribelanta heroo Li Kui, kaj fama dramisto Ji Junxiang (Ĝji Ĝjunŝjang) de la historia dramo “Orfo Zhao”. Ĉiuj iliaj verkoj estas famaj kun aparta stilo. Yuan-dinastio ja estis epoko kiam prosperis ĉina teatro. ■

ELEKTITA VERKO DE WANG SHIFU

La Okcidenta Ĉambro (Fragmento)

KVARA PARTO

DUA AKTO

SinJORINO Cui venas kun sia fileto Huanlang sur la scenejon.

S-ino Cui: En la lastaj tagoj, mi rimarkis, ke Yingying parolas heziteme, kvazaŭ zorgo pezas sur ŝia koro kaj ankaŭ ŝia sinteno iom aliĝis. Probable ŝi faris maldecaĵon?

Huanlang: Post via enlitiĝo, antaŭhieraaŭ vespere, mi vidis, ke franjo kaj Hongniang iris kun incenso por kulti diojn kaj ili ne revenis post longe. Mi do revenis hejmen kaj enlitiĝis.

S-ino Cui: Do estas Hongniang, kiu kaŭzis tion. Alvoku Hongniang!

La knabo Huanlang vokas Hongniang.

Hongniang: Frateto, por kio vi vokas min?

Huanlang: Panjo scias, ke vi kaj franjo iris en la ĝardenon kaj batos vin.

Hongniang: Ho! Fraŭlina moŝto, vi kuntrenis min en marĉon! Frateto, reiru antaŭe, mi tuj iros poste. (Ŝi vokas Yingying.) Franjo, malkaŝiĝis la sekreto, kaj la sinJORINO vokas min. Kion fari!

Yingying: Bonvolu kovri la veron por mi!

Hongniang: Ho, mia panjo, vi faris sekretaĵon, do mi diros, ke vi vere tion faris!

Yingying (recitative):

Se l' hela luno plenrondiĝas, nigra nub' ĝin kovros; se bela floro plenfloriĝas, ŝtormo ekmanovros.

Hongniang (kantas laŭ la melodio Yuediao Douanchun):

Vi devus rendevui kaŝe en malluma horo,
por ke daŭradu ĉiam via ĝuo de amoro,
sed pro diboĉo de vi ambaŭ ĉe l' intervidiĝo,
mi ofte sentis ke ĉe l' gorĝo batas mia koro.
Vi devus renkontiĝi nur sub stela lumo,
sed vi kunkuŝis tutanokte en brakumo!
La olda sinJORIN' kun cerbo akra-klera
ja estas tre severa.

Do mi ne provos kompromiti la sinceron
kaj per la lango volvi l' veron.

(Ŝi kantas plu laŭ la melodio Zihuaerxu.)

La olda sinJORINO eble jam divenis, ke fariĝis

geedzoj novaj la klerulo kaj fraŭlino —
per mi, sklavino, vi pariĝis.
Lasttempe vi malalte l' brovojn tenas
kaj la rigardo via pensoplenas.
Alion mi ne priparolu,
alligi l' jupon nun bonvolu
kaj butonumu la ĵaketon,
komparu kun l' antaŭa nunan ĉi aspekton:
fariĝis vi jam belulino
kun ĉarm' malofta de fascino.

Yingying: Hongniang, bonvolu paroli al ŝi kun zorgo!

Hongniang: Kiam mi venos al la sinjorino, ŝi certe demandos min (*kantas laŭ la melodio Jinjiaoye*):

“Mi diris, ke vi la fraŭlinon ĉiam sekvu, gardu,
kiel vi maldece logis ŝin al fi-vagado?”

Kion mi diru, se demandos ŝi pri tio?

Nu, mi konfesos al ŝi pri la kulpa ago.

(*Ŝi kantas plu laŭ la melodio Tiaoxiaoling.*)

En silka litkurteno vi pariĝis kun la viro,
laŭvole plenumiĝis via arda amdeziro.

Ekstere de l' fenestro longe mi sur musko staris,
spite al frosto ŝupetra tuson mi ne faris.

Sed mian delikatan haŭton batos bastonego.

Ho, franjo,

por kio mia komplezema amrilato-flego?

(*Ŝi parolas.*) Fraŭlino, atendu ĉi tie, kaj mi iros al ŝi.
Se mi sukcesos ŝin trompi, tiam ne ĝoju; se ne, ne
ĉagreniĝu.

Hongniang venas antaŭ la sinjorino kaj ŝin salutas.

S-ino Cui: Bubinaĉo, kial vi ne surgenuiĝas? Ĉu vi konfesos, ke vi kulpis?

Hongniang (*surgenuiĝas*): Mi ne scias, en kio mi kulpis.

S-ino Cui: Vi ankoraŭ obstine neas. Se vi konfesos, mi vin pardonos; se ne, mi batos vin ĝis morto! Kiu diris, ke vi iru kun la fraŭlina moŝto en la ĝardenon?

Hongniang: Mi ne iris. Ja kiu vidis, ke ni tien iris?

Sinjorino: Huanlang vidis vin, kaj tamen vi ankoraŭ provas tion nei. (*Ŝi batas Hongniang.*)

Hongniang: Sinjorino, ne kontuzu vian manon. Ne koleru, aŭskultu min. (*Ŝi kantas laŭ la melodio Guisantai.*)

Sidante super brodo kun fratino en vespero,

mi paŭzis kaj interbabilis pri l' afero:

Sinjoro Zhang malsanis longe en sufero.

Ni diris, ke ni iru al lia studio,

por lin konsoli sen via scio.

S-ino Cui: Vi konsolis lin, do kion li diris?

Hongniang: Li diris (*kantas*):

“Post la forpaso de l' danĝero,

la sinjorino dankis min per malespero

kaj mian ĝojon anstataŭis tristsufero.”

Li diris: “Hongniang, vi antaŭe iru sen atendo,

kaj la fraŭlino restu ĉe mi por momento.”

Sinjorino: Ŝi estas fraŭlino, kial do restigi ŝin!

Hongniang (*kantas laŭ la melodio Tusier*):

Mi pensis, ke ŝi eble lin kuracos per akupunkturo,
sed ne atendis, ke celatis nur amorplezuro.

Jam de pli ol monato ili kuŝis kiel geamanta paro,
ĉu vi bezonus pridemandi ĉion en detalo?

(*Ŝi kantas plu laŭ la melodio Shengyaowang.*)

Kaj ili ne sin ĝenis per skrupulo,
nek per zorgotorturo,
du koroj kunligiĝis per fideleĵuro.
Se eble, sinjorino, ilin lasu,
senpune tio pasu,
por kio vi kulpecon en ĝi ĉasu?

Proverbo diras: Fraŭlinegon teni ne okazu.

Sinjorino Cui: En tio kulpis ja vi, bubinaĉo.

Hongniang: Kulpis nek sinjoro Zhang, nek la fraŭlino,
nek Hongniang, sed via sinjorina moŝto.

S-ino Cui: Bubinaĉo, vi kulpigas min. Kial do mi kulpis?

Hongniang: Fidindeco ja estas baza virto de la homoj.
“Ja estas malbone, se oni ne tenas sian fidindecon. Kiel veturilo povus iri sen timono?” Antaŭe, kiam la templo Pujiu estis sieĝata, -via sinjorina moŝto promesis edziniĝi la filinon al tiu, kiu forpelos la banditojn. Se sinjoro Zhang ne amus la belan fraŭlinon, ĉu li povus proponi sian helpon? Post la forpelo de la sieĝantoj, fariĝis paco, kaj via sinjorina moŝto ekpentis pri via promeso. Ĉu tio ne signifas rompon de la fidindeco? Se vi ne volis plenumi la promeson, vi devus rekompenci s-ron Zhang per mono kaj silkaĵoj, kaj diris, ke li foriru. Sed vi restigis lin en la studio, ke la fraŭlo kaj fraŭlino ŝtele okulumu unu la alian. Vi eraris en tio. Se nun via sinjorina moŝto ne lasus pasi la aferon, vi makulus la honoron de la ĉefministra domo, kaj cetere, se s-ro Zhang prosperos en sia kariero, ĉu li tolerus la ofendon post sia dankinda helpo? Se vi prezentus la aferon al juĝejo, vi estus kulpigota pro malzorgo pri disciplino en eduko al la infanoj. Se la juĝistoj detale esplorus, ili malkovrus, ke via sinjorina moŝto rompis viajn vortojn kaj estas sendanka al la savinto, ĉu vi meritis la titolon de virtulino? Mi ne kuraĝas aserti ke mi pravus, kaj petas, ke via sinjorina moŝto mem pripensu prudente. Mi pensas, ke estus prudente pardoni ilian kulpeton kaj aprobi ilian geedziĝon, kaj per tio ilin senmakuligi. Ĉu tio ne estus bona solvo? (*Ŝi kantas laŭ la melodio Malang'er.*)

Klerulo Zhang elstaras inter la literatoroj,

fraŭlino mia vere belas en plej alta grado;

el ili unu konas ĉion pri la kleraj skoloj,

l' alia lertas en feniksdesegnado kaj brodado.

(*Ŝi kantas plu laŭ la melodio Yaopian.*)

Ne raras tiaj kazoj, licas lin indulgi.

Ĉu decus la savinton persekuti?

Venigis li amikon Baima- Generalon,

kaj ties trupoj venke batis Feihu-banditaron.

(*Ŝi kantas plu laŭ la melodio Luosiniang.*)

Se vere vi ekstarus kontraŭ sinjoro Zhang, la klerulo,
sur via domo ĉefministra nigros hont-makulo.

Koncernas tio vian propran sangparencon,

pripensu, sinjorino, kun skrupulo.

S-ino Cui: Tamen vi, bubino, diris prave. Mi ne devus havi tiun ĉi senmoralan filiĝon. Se mi min turnus al juĝejo, makuliĝus la honoro de nia domo. Nu, lasu! Neniu viro el mia familio krimis nek iu el niaj virinoj reedziniĝis, do mi donu la filinon al la knabo. Hongniang, alvoku la knabinaĉon!

Hongniang (*ekvidinte Yingying*): Feliĉon, fratino! La bastono promenadis sur mia korpo, do mi konfesis ĉion; mi ja ne povis tiel multe zorgi. Nun la sinjorino moŝto vokas vin kaj intencas edzinigi vin al li.

Yingying: Mi hontas. Kiel mi povus min prezenti al la patrino?

Hongniang: Pri kio honti antaŭ la patrino? (*Ŝi kantas laŭ la melodio Xiaotaohong.*)

En tiu tag' la lun' apenaŭ super salikkapo lumis,
en la krepusk' vi rendevuon jam plenumis.

Hontante l' erotikon,

la kapon mi deturnis, mordis la manikon,
sed per subita okulumo

mi vidis, ke koketas via pinta ŝuplandumo,
senbride unu dronis en la ĝuo de amoro,
l' alia raŭkis pro plezuro de la seksa moro.

Fi!

Kial vi tiam tute ne perceptis senton de pudoro?

(*Yingying venas al la patrino kaj ŝin salutas.*)

S-ino Cui: Yingying, kiel mi edukadis vin? Sed vi faris tian senhontaĵon. Vi ja estas mia, do kiun mi koleru! Se mi min turnus al juĝejo, makuliĝus la honoro de via patro per la fiaĵo, kiu ne devus okazi al la domo de ĉefministro. Nu, do lasu! Kiu tiel senvirtas kiel mia filino! Hongniang, iru al la studio kaj venigu la brutulon!

(*Hongniang vokas s-ron Zhang.*)

Zhang: Por kio vi vokas min, fraŭlino?

Hongniang: Via sekreto malkaŝiĝis, kaj la sinjorino vokas vin kaj volas edzinigi al vi la fraŭlinon. La fraŭlino jam konfesis, do vi iru nun.

Zhang: Mi timas. Kiel mi min prezentu antaŭ la sinjorino? Kiu malkaŝis tion al ŝi?

Hongniang: Ne ŝajnu timemon, sed iru al ŝi. (*Ŝi kantas laŭ la melodio Xiaotaohong.*)

Ĉu eblus plu kvieto se jam malkovriĝis la sekreto?

Konfesis mi ĉe la enketo.

Mi servis vin per vino, teo, komplezemo kaj ideo.

En trankvileco restu,

ja ne necesas antaŭnupta fianĉiga festo.

Preferus mi rezigni ol daŭrigi la kultivon,

vi, povra planto, ja ne havos perspektivon.

Fi, kia viro!

Vi, stan-aloj-rapiro kun arĝenta brilo!

(*Zhang venas al sinjorino kaj ŝin salutas.*)

S-ino Cui: Brava sinjoro! Ĉu vi ne lernis, ke "ne kuraĝu fari tion, kio ne konformas al la sanktula moralo"? Mi volus sendi vin al la juĝejo, sed mi timas, ke tio makulos mian familian honoron. Nun mi donas al vi Yingying kiel edzinon. Sed tamen de tri generacioj nia familio ne akceptis senrangan viron kiel bofilon, tial morgaŭ vi jam vojaĝu al la ĉefurbo por ekzamenado. Mi zorgos por vi la edzinon. Se vi akiros ŝtatoficistan rangon, revenu al mi; alie, ne revidu min.

Hongniang: Sinjoro Zhang jam ekĝojis. (*Ŝi kantas laŭ la melodio Dongyuanle.*)

Jam estas fino

de l' amsopiro,

ne plu necesas la antaŭa brov-kuntiro.

Ĵus komenciĝis via ama vivplezuro,

se vin kunligos nupto,

ĉi tiun ĉarman bildon de vizaĝo ĝuos feliĉulo.

S-ino Cui: Morgaŭ pretigu la valizojn, aranĝu bankendon kaj invitu la abaton al la Dek-lia Kiosko* por kune adiaŭi sinjoron Zhang.

Yingying (*recitative*):

Sciigu la salikojn ĉe la okcidenta digo,

ke ili diru kun l' okuloj verdaj**: Ĝis revido!

(*Ŝi kaj la sinjorino eliras.*)

Hongniang (*kantas laŭ la melodio Shouwei*):

Je via revenhoru,

aŭdiĝos en salono gongo- kaj tambursonoro,

vi pare staros kun fidela ama koro.

Nur tiam, mi, pro mia svat', akceptos

la dankon vian per arĝento kaj likvoro.

Elĉinigus LAŬLUM

* Dek-lia Kiosko — en antikva Ĉinio, ĉe la ŝoseoj kioskoj estis konstruitaj kun interspaco de dek lioj, t.e. kvin kilometroj, por ke vojaĝantoj ripozu aŭ adiaŭu siajn karulojn ĉe ili.

** T.e. la folioj okulsimilaj.

ABONTARIFO DE EPĈ

(ekvalidas la 1-an de oktobro 1988)

lando	valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.00	25.00	35.00
Aŭstrio	ATS	200	340	480
Belgio	BEF	550	930	1300
FR Germanio	DEM	30.00	50.00	70.00
Britio	GBP	8.00	13.60	19.00
Finnlando	FIM	64.00	108.00	150.00
Francio	FRF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	ESP	1200	2000	2900
Italio	ITL	18000	30600	43000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Jugoslavio	YUD	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZD	20.00	34.00	48.00
Portugaliao	PTE	1100	1800	2600
Svisio	CHF	25.00	42.00	60.00
Usono	USD	12.00	20.00	28.00
Kanado	CAD	14.00	23.00	33.00

Por aliaj landoj en Eŭropo:

GBP	8.00	13.60	19.00
USD	10.00	17.00	24.00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

GBP	5.00	8.50	12.00
USD	6.50	11.00	16.00

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



VOJAĜO LAŬ YANGZI-RIVERO (32)

Ŝanhajo, urbego kreita de Yangzi

de **GU YUAN**

La haveno de Ŝanhajo

Foto de **XU YIGEN**





Parto de Ŝanhajo

Foto de YANG PUTAO

PER ŝipo mi veturis de Nantong al Ŝanhajo ĉe la orienta marbordo. Tie Yangzi-rivero finis sian tutan vojaĝon kaj enfluas en la Orientan Ĉinan Maron.

Ŝanhajo estas la plej granda urbo de Ĉinio. Ĝi situas en la meza parto de la orienta marbordo de Ĉinio, limtuŝas kun Yangzi en nordo, rigardas orienten al la maro kaj suden al Hangzhou (Hangĝou)-golfo kaj ligiĝas kun la provincoj Jianguo (Ĝjanguo) kaj Zhejiang (Ĝeĝjang) en okcidento. Ĝi estas grava ekonomia, financa, trafika, scienca, kultura kaj eduka

centro de Ĉinio.

KONTRIBUO DE ŜANHAJO

Antaŭ dekmil jaroj Ŝanhajo estis maro. En la postaj jaroj la toranta akvo de Yangzi ĉiujare kunportis grandan kvanton da ŝlimo al la Orienta Ĉina Maro. La ŝlimo sedimentis en la maro kaj iom post iom formiĝis en teron.

En 1273 aperis la urbeto Ŝanhajo. En la lastaj jaroj de Qing (Ĉing)-dinastio (1644-1911) ĝi fariĝis havenurbo kun 200 000 lo-

ĝantoj. Iuj ciferoj montris la ekonomian disvolviĝon de Ŝanhajo post 1949: Ĝia totala industria kaj agrikultura produktovaloro en 1987 kreskis 21-oble kaj ĝia totala eksportoaloro 34-oble, kompare kun tiuj en 1952. Nun Ŝanhajo jam fariĝis industria urbo kun pli ol dek milionoj da loĝantoj kaj 149 industriaj branĉoj (Ĉinio havas 166 industriajn branĉojn). La favora geografio, oportuna trafiko, longa historio de ekstera komerco kaj la supereco de ekonomio, tekniko kaj informoj faris Ŝanhajon la plej granda eksterkomerca centro de



Ĉinio. Ŝanhajo starigis konstantan komercan rilaton kun pli ol 170 landoj kaj regionoj kaj havas intiman kontaktigon kun pli ol 20000 alilandaj firmaoj.

Kion signifas nun ĉiu aferoplana tago de Ŝanhajo? Ĝi signifas krei industriajn produktovaloron de 268 milionoj da juanoj, plenumi socian detalan vendon de varoj valorantaj 65 milionojn da juanoj kaj investon de fiksa kapitalo de pli ol 50 milionoj da juanoj, konstrui loĝdomojn kun plank-areo de 13000 kvadrataj metroj kaj eldoni 6.15 milionojn da ekzempleroj da ĵurnaloj kaj 1.16 milionojn da ekzempleroj da libroj. Ŝanhajo en unu jaro plenumis dekduonon de la totala industria produktovalorado de Ĉinio, trionon de la havena varŝarĝa kaj varmalŝarĝa kvanto kaj dekonon de la eksportitaj varoj kaj financa enspezo.

EN LA REFORMA SITUACIO

En la dek jaroj de 1978 ĝis 1988 Ŝanhajo vaste praktikis en la entreprenoj diversformajn respondecajn sistemojn de laŭkontrakta entreprenado kaj tiujn de fabrikestroj (direktoroj), senĉese grandigis horizontalan ekonomian kunligigon, kaj la reformado de financa sistemo pligrandigis la mon-investan merkaton kaj plivigliĝis mon-

prunton.

Depost junio 1979, direktate de la reforma kaj pordomalferma politiko, Ŝanhajo ĝemeliĝis kun 16 urboj de Japanio, Usono, FR Germanio kaj aliaj landoj, formis la Ŝanhajan Ekonomian Regionon kune kun la provincoj Jiangsu, Zhejiang, Anhui, Jiangxi (Ĝjangŝji) kaj Fujian (Fuĝjan) kaj fariĝis ĝia centra urbo. Proksima al Yangzi kaj la maro, ĝi havas eksteran kaj internan ekonomiajn superecojn kaj faras kontribuon al la moderniga konstruado de Ĉinio.

En la pasintaj 30 jaroj de la fondiĝo de la nova Ĉinio ĝis 1978 Ŝanhajo enkondukis alilandan kapitalon de 60 milionoj da usonaj dolaroj, kaj en 1985 ĝi jam enkondukis alilandan kapitalon de miliardo da usonaj dolaroj. La avangardaj ekipaĵoj importitaj el aliaj landoj altigis la kvaliton de produktaĵoj de Ŝanhajo kaj produktis nemalmultajn novajn industriaĵojn kun internacie konkurenca povo. Por logi investadon de alilandaj komercistoj, Ŝanhajo konstruis en la lastaj jaroj la ekonomiajn kaj teknikajn ekspluatajn distriktojn Minhang, Hongqiao (Hongĉjaŭ) kaj Caohejing (Caŭheĝing). Minhang konstruas ĉefe entreprenojn fonditajn per ĉina kaj alilanda kapitalo, tiujn fonditajn en ĉina kaj alilanda kunlaboro kaj tiujn fonditajn per aparta kapitalo de alilandaj komercistoj. Hongqiao


estos distrikto de alilandaj konsulejoj, komercaj domegoj kaj luksaj hoteloj servantaj al alilandaj komercistoj en investado. Caohejing uzas ĉefe alilandan kapitalon por disvolvi novajn teknikojn, kiaj mikroelektroniko, komputilo, fotofibro kaj lasero.

DU GRANDAJ KONSTRUOJ

De post la 70-aj jaroj oni stariĝis ĉe Hangzhou-golfo kaj Yangzrivero sude kaj norde de Ŝanhajo du grandajn konstruojn, la Jinshan(Ĝinŝan)-an Ĝeneralan Petrol-kemian Fabrikon kaj la Baoshan-an Ĝeneralan Ŝtalan Fabrikon.

La Jinshan-a Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko konstruiĝis sur marbordo, kie pasintecce estis akvo dum fluso kaj ŝlimo post malfluso. Konstruistoj el diversaj partoj de la lando penlaboris plurajn jarojn. Ili enkondukis avangardajn ekipaĵojn el Japanio kaj FR Germanio kaj finkonstruis modernan petrol-kemian bazon kun pli ol dek fabrikoj. Tie estas multaj turoj, cisternoj, tuboj kaj konstruaĵoj. En la tri jaroj post la ekfunkcio la petrol-kemia bazo jam donis profiton, egalan al ĝia tuta investita monsumo. Ĉiujare ĝi kreas produktovaloron de tri miliardoj da juanoj kaj eksportas produktaĵojn valorantajn 60 milionojn da usonaj dolaroj. Nun ĝi faras triaperiodan konstruon. Apud ĝi la Qinshan-(Ĉinŝan)-a Nuklea Elektrejo estas en streĉa konstruado.

La Baoshan-a Ĝenerala Ŝtala Fabriko troviĝas sur pasintaj kampoj kaj fragmitejo. En 1978 oni komencis ĝian konstruadon. Ĝiaj ĉefaj ekipaĵoj kaj teknikoj estis enkondukitaj ankaŭ el aliaj landoj. Ĝi estas granda ŝtala uzino kun internacie avangarda nivelo. Ĝia laborproduktiveco estas 15-oble pli alta ol aliaj ĉinaj ŝtalaj fabrikoj. Ĉiujare ĝi produktas 3 200 000 tunojn da ŝtalo kaj fero. Fininte la duaperiodan konstruon en 1991, ĝi produktos ĉiujare 6 milionojn da tunoj da ŝtalo kaj tiom da fero. Ĝia celo estas produkti ĉiujare 10 mil-



ionojn da tunoj da ŝtalo kaj tiom da fero.

VENAS PLI KAJ PLI DA TURISTOJ

Matene grupo da alilandaj turistoj venis en movoplenan legombazon de Ŝanhajo. La scivolemaj vizitantoj, altiritaj de diversaj fiŝoj kaj legomoj, fotis tion kaj ĉi tion kaj virinojn kun korboj plenaj de legomoj. Unu maljuna paro el la turistoj frandis etmanĝaĵon ĵus preparitan.

Tagmeze la turistoj venis en la domon de iu loĝanto en laborista loĝkvartalo kaj preparis manĝon kune kun la gemastroj. La tagmanĝo fariĝis kulmino de ilia aktivado en la tago. Granda telero da aperit-vekaj *ĝjaŭzi*-oj (ĉina manĝaĵo el faruno kun farĉo) alportis al ili grandan ĝojon. Oni surtabligis fungojn, kaj ili sentis siajn manĝbastonetojn en la mano ne tiel obeemaj. Posttagmeze ili vizitis infanĝardenon kaj elementan lernejon en la laborista loĝkvartalo, rigardis kaligrafaĵojn kaj pentraĵojn faritajn de emeritoj en la klubo de maljunuloj kaj dancis diskon.

Tio estas fragmentoj de "Tago de Alilandaj Turistoj en Ŝanhajo" organizita de la Ŝanhaja Internacia Turisma Servo. Unu tago estas tro mallonga por alilandaj turistoj. En la ĝardeno Yuyuan estas artisme aranĝitaj kioskoj kaj pavilonoj kaj kuriozaj artefaritaj montetoj. La konstruoj de la urbo spegulas la kunfandiĝon de la orienta kaj okcidenta arkitekturoj. La antikvaj stratoj, kortoj kaj diversstilaj konstruoj faris la urbon muzeo de mondaj konstruoj. Oni trovis subtere pli ol 20 ruinojn de la antikva kulturo. Estas mirinda la klinita Perloprotekta Pagodo sur la Ĉielĉevala Monto en la antaŭa urbo. Ankaŭ veturo per ŝipo sur Huangpu-rivero, aĉeto de metiartaĵoj en antikvaj vendejoj kaj ĝuo de artisme faritaj pladoj en restoracio de luksaj hoteloj tre interesis la turistojn.



Ekspluata distrikto

Foto de YANG PUTAO

En la lastaj jaroj senĉese plimultiĝis alilandaj turistoj en Ŝanhajo. Laŭ la statistiko de la Ŝanhaja Internacia Turisma Servo, en 1987 venis al Ŝanhajo 760 000 alilandaj turistoj, duoble pli multe ol tiuj en 1982. El la alilandaj turistoj en Ĉinio ĉ. 70% volas viziti Ŝanhajon. Oni taksis, ke en la jaro 2000 Ŝanhajo akceptos 2.5-3.5 milionojn da turistoj el aliaj landoj kaj el Hongkong, Aomen kaj Taiwan.

ALLOGA MORGAŬO

Kiam alilandaj turistoj venos al Ŝanhajo en la fino de la kuranta jarcento, ili vidos la urbon kun tute nova aspekto. La magistrato de Ŝanhajo jam ellaboris ĝeneralan projekton por disvolvi la urbon, laŭ kiu oni aktive ekspluatos Pudong, distrikton oriente de Huangpu-rivero dum konstruado kaj transformado de la centra urbo, kompletigos kaj disvolvos satelitajn urbojn, konstruos ĉirkaŭajn urbetojn, laŭpaŝe etendos la disvolvon al la norda bordo de Hangzhou-golfo kaj al la suda bordo de Yangzi-rivero ĉe ĝia buŝo por formi urbo-sistemon el la centra urbo, satelitaj urboj, ĉirkaŭaj urbetoj kaj vilaĝoj.


Pudong en la projekto estos nova parto de Ŝanhajo. Tie oni konstruos novteknikajn industriajn distriktojn kaj poreksportajn prilaborajn distriktojn, internacian foiron, financan kaj komercan centron, sportan centron, sciencan, kulturan kaj edukan kvartalon, la

duajn ŝanhajan havenon kaj ŝanhajan aerodromon, grupojn da loĝdomoj kaj koncernajn urboinstalaĵojn. En la nova Pudong la fervojoj kaj aŭtovojoj interkruziĝos kaj interligiĝos kun tiuj de la malnova urbo pere de la Huangpu-riveraj pontoj kaj transriveraj tuneloj.

Samtempe kun tio, oni plenenergie transformos kaj konstruos la malnovan urbon de Ŝanhajo kaj interligos ĝin kun la sep satelitaj urboj. Ĉiu satelita urbo havos sian originalan trajton. Wusong estos ŝtala urbo, Jiading — scienca urbo Anting — aŭtourbo, Wujing — kemiindustria urbo...

Oni plenumis multajn konstruojn subtere, kiaj laborejoj, staploj, elektrejoj kaj eksperimentejoj. Multaj subteraj konstruoj estas destinitaj por hoteloj, restoracioj, magazenoj, teatroj kaj legoĉambroj. Ankaŭ la subtera fervojo estos konstruata. La morgaŭa Ŝanhajo estos tridimensia urbo.

Estas menciinde, ke laŭ la havena projekto de Ŝanhajo oni konstruos tri novajn havenojn laŭ Yangzi-rivero kaj norde de Hangzhou-golfo. Tiuj havenoj kune kun la nunaj havenoj de Ŝanhajo, la najbara Zhangjia (Ĝangĝja)-haveno de Jiangsu-provinco, Beilun-haveno de Ningbo kaj la ekspluatebla Zhoushan (Ĝoŭŝan)-insularo formiĝos en grandan orientan havenon. Baldaŭ Ŝanhajo fariĝos la plej granda centro de ekonomio kaj ekstera komerco ĉe la okcidenta bordo de Pacifiko.



Instalaĵo por reaktoro farita de la Qinŝan-a Nuklea Elektrejo

Foto de ZHANG PING

Komputilejo por ŝarĝo kaj malŝarĝo de konteneroj

Foto de ZHAN PING



TRONEJO EN LA PALACO

Teksto de MU YI

Fotoj de JAN JIN

MALANTAŬ la alta Taihe-pordego sterniĝas vasta kaj impona placo. En la fundo norde de ĝi staras grandioza konstruaĵo. Ĝi estas la mondfama tronejo Taihe-halo.

La halo estis konstruita en 1420, nome en la 18-a jaro de la regperiodo Yongle de Ming-dinastio (1368-1644). Dum la 275 jaroj post tio la halo estis plurfoje rekonstruita pro la detruo de incendio kaj tertremo. La lasta restituo plenumiĝis en 1695, t.e., en la 34-a jaro de la regperiodo Kangxi de Qing-dinastio (1644-1911).


Taihe-halo estas la ĉefa konstruaĵo de la antaŭa parto de la Imperiestra Palaco. Ĝiaj skalo, plastiko, dekoro kaj ornamado estis aranĝitaj senescepte en plej alta normo. La halo kovras 2377 kvadratajn metrojn kaj altas 29.93 metrojn. La tegmento havas du alerojn. La halo sidas sur triŝtupa bazamento ĉirkaŭita de blankmarmoraj balustroj, ĉiu kun supro en formo de drako aŭ fenikso. Al la halo kondukas tri ŝtonaj ŝtuparoj, ambaŭflanke de kiuj estas metitaj 18 bronzaĵaj tripiedaj incensujoj. Okcidente kaj oriente de la teraso antaŭ la halo estas bronzaĵaj testudoj kaj gruoj, kiuj simbolas longvivecon kaj eternan prosperon de la ŝtato. Sudoriente de la teraso estas gnomono kaj sudokcidente — mezura ujo. Gnomono estis horloĝo, kaj la mezura ujo — mezurilo de kapacito en la antikva Ĉinio. Ili simbolas la regadon de imperiestro super tempo kaj spaco. Antaŭe, kiam okazis gravaj solenoj, la bronzaĵaj incensujoj, testudoj kaj gruoj ellasis fumon de brulanta santalo, kio misterigis la atmosferon.

Paŝinte en la halon, vi povas tuj rimarki la vastan oritan brakseĝon kun reliefaj drakoj sur la sepŝtupa bazo. Tio ja estas la trono de imperiestro. Antaŭ la trono estas incensujoj kaj tabloj, kaj malantaŭ ĝi ŝirmas orita ekrano. Ambaŭflanke de la trono staras po tri dekmetraj kolonoj brakumebloj de du homoj kaj ornamitaj per oraj drakoj ĉirkaŭvolvantaj. Eble vi jam rimarkis, ke en kaj ekster la halo la bazaj koloroj estas ruĝa, blua kaj verda. En la halo estas 72 kolonegoj kaj pilastroj, el kiuj la plejparto estas ruĝe kolorigita. Nur la ses en la centro de la halo estas oritaj. Ili markas la plej altan dignon de la halo kaj faras la atmosferon pli impona.

Trono de imperiestro



PLANO DE LA MALPERMESTA URBO



N-ro 4 en la plano signas Taihe-halon.

Taihe-halo estas mondo de drakoj. Multaj traboj kaj diloj surhavas kolorajn bildojn kun oraj drakoj. Ĉiuj ses kolonoj estas ĉirkaŭvolvitaj de oraj drakoj naĝantaj en nubaro. La trono kaj la ornamaĵoj ĉirkaŭe senescepte prenas drakon kiel la ĉefan temon. La trono estas majstre farita. Ĝi havas dorsoapogilon. La kvar kolonetoj estas ĉirkaŭitaj de flugantaj drakoj. La dorsoapogilo surhavas altarelian drakon en nubaro. Sur la plafono malsupren rigardas ora drako, en kies buŝo estas giganta globo. Sur la ekrano malantaŭ la trono estas drakoj flugantaj, kuŝantaj aŭ irantaj. Tiuj drakoj faras la tronon pli impona kaj donas originalan artan ĝuon.

Taihe-halo estis loko por gravaj ceremonioj en Ming- kaj Qing-dinastioj. Tie okazis ceremonioj por surtroniĝo kaj edziĝo de imperiestro, instalado de imperiestra edzino, la unua tago de jaro, vintra solstico, datreveno de la naskiĝtago de imperiestro, publikigo de la nomoj de la plej elstaraj sukcesintoj en la ŝtata ekzameno, nomumo de ĉefkomandanto k.a.

En Qing-dinastio la ceremonio por surtroniĝo estis ekstreme solena. Antaŭ la ceremonio ŝtatoficistoj devis kulti la ĉielon, la teron, la prapatran templon

kaj la Ter- kaj Gren-dian Altaron. En kaj ekster la halo estis ceremoniaj gvardioj. Sub la tegmento estis orkestro por la muziko Zhongheshao Yue (titolo de antikva muzikopeco) kaj interne de Taihe-pordego orkestro de la muziko Danbidayue (titolo de antikva muzikopeco). Ĉe la komenco de la ceremonio, iu plej altranga civila kortegano kun aliaj iris al Qianqing-halo por porti la "trezoron de imperiestro" (imperiestra sigelilo) sur la trezoran tablon antaŭ la trono en Taihe-halo. Iu oficisto de la kabineto metis dekreton sur la tablon apud la trezora tablo; oficistoj de la ceremonia ministerio metis dokumenton sur la tablon kaj mezrangulo de la kabineto metis skribilaron sur ĝin. La princoj staris sur la teraso, dum la oficistoj de la unua ĝis la naŭa klaso staris en 18 grupoj ambaŭflanke de la imperiestra vojo sur la placo antaŭ la halo. Ĉiuj staris kun la vizaĝo al la nordo. Kiam ĉio estis preta, la surtroniĝonta kronprinco en ceremonia kostumo venis al la loĝejo de la patrino, trifoje surgenuiĝis kaj naŭfoje klinis la kapon teren antaŭ ŝi. Post tio li revenis al Qianqing-halo. Du oficistoj de la ceremonia ministerio venis peti lian eliron. Palakeno portis lin kaj oni sonigis sonorilon kaj tamburon sur Wumen-pordego. La imperiestro venis al Zhonghe-halo, la korteganoj, gvardianoj, kabinetanoj, oficistoj de la ceremonia kaj kontrolo ministerioj venis al la halo por adorkliniĝi al la imperiestro. Poste, la ceremonia ministro surgenuiĝis sub la alero por peti la imperiestron iri al Taihe-halo. Tiam sub la ŝtuparo oni krakis per vipo (el silko, kun longo de dek metroj) kaj ludis la muzikon Zhongheshao Yue. La imperiestro sidigis sur la trono kaj la princoj, korteganoj kaj oficistoj gratulis lin per trifoja genuiĝo kaj naŭfoja ĝistera kapklino. Poste, la plej altranga civila kortegano venis antaŭ la tablon, sur kiu estis la dekreto de la forpasinta imperiestro, kaj legis ĝin. La oficisto venis antaŭ la trezoran tablon kaj petis la imperiestron sigeli la dekreton per la "trezoro de imperiestro". Poste, oni publikigis ĝin al la tuta lando, ekludis muzikon kaj krakis per la vipo, dum la imperiestro reiris al sia palaco. Jen estis finita la ceremonio.

Dum la ceremonio estis malfacile por la korteganoj vidi la imperiestron. Estis granda honoro kaj favoro esti vokita de la imperiestro antaŭ la tronon.

En Taihe-halo okazis antaŭ la ceremonio de ekspedicio kaj nomumo de ĉefkomandanto. Sur la teraso antaŭ la halo instaligis ceremonia gvardio. La ĉefkomandanto kaj generaloj atendis ekster Wumen-pordego. La imperiestro venis al Taihe-halo akompanate de impona sekvantaro. Oficistoj de Honglusi (la plej alta ŝtatoficejo por ritario) kondukis la ĉefkomandanton sub la aleron laŭ la maldekstra ŝtuparo. La plej altranga civila kortegano transdonis al li la ĉefkomandantan sigelilon kaj tiu ĉi akceptis ĝin surgenuie. Poste, la ĉefkomandanto trifoje surgenuiĝis kaj naŭfoje kapkliniĝis antaŭ la imperies-

tro, reiris laŭ la maldekstra ŝtuparo kaj eliris tra Taihe-pordego. Kaj la imperiestro reiris en sian internan palacon. En la tago, kiam la armeo estis preta al militiro, la imperiestro persone gvidis la ĉefkomandanton kulti la standardon kaj tostis por li. Fine, la ĉefkomandanto surĉevaliĝis kaj foriris el la ĉefurbo. Kiam la armeo revenis kun triumfo, la imperiestro akceptis la meritoplenajn militistojn en Taihe-halo, reprenis la ĉefkomandantan sigelilon kaj donis al ili festenon.

En la dinastioj Ming kaj Qing, ofte okazis en Taihe-halo festenoj post gravaj ceremonioj.

Festenado en Taihe-halo estis tre interesa. La ceremonia gvardio kaj la orkestro estis preskaŭ samaj al tiuj por matena kunveno ĉe la imperiestro. La princoj kaj korteganoj de la unua kaj dua klasoj ĝuis la festenon en la halo, la aristokratoj super la dua klaso sidis sur la teraso antaŭ la halo, kaj oficistoj sub la tria klaso kaj fremdlandaj delegitoj sidis en 16 bluj tendoj provizore starigitaj sur la placo. La tabloj altis nur pli ol unu futon kaj ĉiu havis antaŭ si unu tablon. Sed por la malaltrangaj oficistoj du aŭ tri disponis unu saman tablon. Ĉiuj festenantoj sidis surtere.

Laŭ noto en historia libro, la amasigitaj kukoj, farunaĵoj, fruktoj kaj konfitaĵoj por novjara festeno sur ĉiu tablo devis atingi la alton de 40 cm. Krom tiuj, estis ankaŭ viandaĵoj kaj vino. En la unuaj jaroj de Qing-dinastio ĉiu granda festeno konsistis el 210 tabloj kaj forkonsumis cent ŝafojn kaj cent botelojn da vino. Sed iom post iom malmultiĝis la konsumaĵoj.

Ekludo de orkestro markis la komencon de la festeno. La imperiestro sidiĝis sur la trono. Post vipkrakado la festenantoj surloke adorkliniĝis al la imperiestro. La imperiestro tetrinketis, invitis tetrinki, vintrinketis kaj invitis vintrinki, prenis manĝaĵon kaj invitis manĝi. Post tio gvardiano kaj organizanto de la festeno iris tosti por ĉiu festenanto. Dum la festeno senĉese ludis la orkestro. Post la festeno estis prezentata varieteo. Ĉiuj ĉeestantoj devis plurfoje kapkliniĝi ĝistere por esprimi dankon al imperiestro, tial la festenado fakte ne estis plezuriga.

En la dinastioj Ming kaj Qing Taihe-halo servis kiel salono, kie imperiestroj akceptis vasalojn kaj




En Taihe-halo

Foto de HU CHUI

alilandajn delegitojn. Dum la regperiodo Yongle de Ming-dinastio, la reĝo de Sulu (parto de la nunaj Filipinoj) vizitis Ĉinion, kun granda delegacio el reĝedzino, princoj, korteganoj kaj centoj da sekvantoj. La ĉina imperiestro Zhu Di solene akceptis ilin en Taihe-halo (tiam la halo nomiĝis Fengtian), reciprokis donacojn dum la festeno kaj kune kun ili ĝuis varieteon. Post unu jaro mortis la reĝo survoje al sia patrolando. Zhu Di persone faris por li epitafon kaj entombigis lin en Shandong-provinco.


Estis drama la akcepto de imperiestro Ajsingoro Hongli (1736-1795 sur trono) al la brita delegacio de George Macartney. Ĉe la komenco, por esprimi sian respekton, la ĉina imperiestro sendis bonvenigi la delegacion ĉe la Orienta Ĉina Maro kaj akceptis



Taihe-halo



Blankmarmora balustrado




Bronza testudo

Macartney en la Someruma Vilao. Sed la delegacio pretendis koncesion de ĉina insulo. Tio multe malagrabligis la imperiestron, kaj la registaro plurfoje petis la delegacion forlasi Ĉinion. Sed la delegacio persiste restis en Ĉinio. Sekve, la registaro de Qing-dinastio devis okazigi en Taihe-halo ultimatan adiaŭnan ceremonion. En kroniko legiĝas, ke tiutage

la halo estis dekoraciita impone. Meze de la teraso estis donacoj de la ĉina imperiestro al la brita reĝo. En la halo estis flava tablo, sur kiu kuŝis la letero de la ĉina imperiestro al la brita reĝo. Akompanate de ĉina kortegano, la brita delegito eniris la halon. La plej altranga civila kortegano He Shen reciprokis saluton kun la brita delegito kaj severe diris al li:




Mezura ujo



Bronza gruo

“La letero kaj donacoj de nia imperiestra moŝto al via reĝa moŝto estas pretaj. Ni tuj portos ilin al via loĝejo. Tio estas la lasta programero de via restado en Ĉinio.” Je tio li ordonis la akompanantan korteganon elkonkuki la gaston, kaj li mem foriris la unua. Do, krom reiri al Britio, la delegacio de Macartney povis fari nenion. ■



12 junaj nobelinoj



12 junaj nobelinoj estas figuroj kreitaj en la fama ĉina klasika romano "Songô en Ruĝa Buduaro". La pentritaj figuroj estas versimilaj.

La romano estis verkita de Cao Xue-qin (Caŭ Ŝjueĉin) en Qing(Ĉing)-dinastio (1644-1911). Ĝi priskribas la prosperon kaj malprosperon de granda burokrata familio kaj per tio severe malkaŝas kaj kritikis la putran feŭdan socion.

La poŝtmarko-serio konsistas el 12 pecoj kaj unu bloko, kiuj emisiigis la 20-an de novembro 1981 kaj la 24-an de aprilo 1982 respektive.